

Bulgara ESPERANTISTO



63-a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO
VARNA (BULGARIO)
1978 JULIO 29 — AŬGUSTO 5



E N H A V O

P. Tanĉev. Salutparolado	1	Ekspozicioj	22
П. Танчев. Приветствено слово	3	Fermo de la 63a UK	23
* * * Honora Komitato, LKK kaj Kongresa Prezidantaro	4	Rezolucio de la 63a UK	24
* * * Grandioza UK de E-to	6	Ĉe la E-domo en Pisanica	24
H. Tonkin. Salutparoladoj ĉe la inaŭguro	7,8	N. Andrianova. Rememore al la 63a	25
A. M. M'Bow. Mesaĝo	8	Intervjuo kun H. Tonkin	25
Malfermo de la 63a UK	9	La 63a UK en la bulgara gazetaro, radio, televido kaj filmo	26
Diskuttrondoj pri la kongresa ĉeftemo	9	Renkontiĝo de sofiaj kaj sovetaj e-istoj	27
Ĝeneralaj kunvenoj de UEA	11	R. Konstantinova. Postkongresa kunveno de la Sofia E-societo „M. Gorkij“	28
Fakaj kunvenoj	11	34a Internacia Junulara Kongreso de TEJO	29
Belartaj Konkursoj	17	Rezolucio de la IJK	31
Internacia Somera Universitato	17	Intervjuo kun Savas Tsiturides	32
Esperantologia Konferenco	19	16a Infana Kongreseto	32
Lingvaj kursoj	20	Deziras korespondi	III
Kunsidoj de la Komitato de UEA	20	Anoncoj pri la abonkampanjo de „Bulgara Esperantisto“ kaj la forestaj E-kursoj	IV
Teatraĵoj	20		
Bulgara Vespero	21		
Internacia Arta Vespero	21		
Koncerto de Veselin Damjanov	21		
Ekskursoj	22		

Fotoj: La infanoj el la Infana Kongreseto salutas la 63an UK
Rigardo al la kongreshalo „Hodler“.



**SALUTPAROLADO**

de PETRO TANĈEV, unua vicprezidanto de
la Ŝtata Soveto de Popola Respubliko Bulgario
kaj prezidanto de la Honora Komitato de
la 63-a Universala Kongreso de E-o

Estimata s-ro prezidanto de la Universala E-Asocio!

Karaj kongresanoj kaj gastoj!

Kamaradinoj kaj kamaradoj!

Sinjorinoj kaj sinjoroj!

Mi gojas, ke mi havas la honoron en la nomo de la Ŝtata Soveto kaj de la Registaro de Popola Respubliko Bulgario, en la nomo de la bulgara popolo kaj en mia nomo elkore saluti vin okaze de la malfermo de la 63-a Universala Kongreso de E-o.

Mi estas feliĉa transdoni al vi la varmajn kaj plej korajn salutojn de la ŝtatestro de Popola Respubliko Bulgario Todor Ĵivkov — granda amiko de la e-istoj el la tuta mondo, kiu alte taksas la internacian lingvon E-o kiel lingvon de paco kaj amikeco inter la popoloj. (Tondraj aplaŭdoj).

Mi volas esprimi mian grandan kontenton pri la fakto, ke dum la lastaj 15 jaroj duan fojon vi, reprezentantoj de Eŭropo, Azio, Latinameriko, Afriko kaj Aŭstralio, kunvenas en nia lando por trakti la problemojn kaj la taskojn de la internacia E-movado. Ni alte taksas vian rekonon pri la agado de la bulgaraj e-istoj kaj ni akceptas tion kiel altan honoron por Bulgario, kiu firmigas kaj subtenas la aferon de la e-istoj. Mi esperas, ke ankaŭ ĉi-foje, en nia nigramara belulino Varno, vi havos la eblecon konvinkiĝi pri la tradicia kaj varma bulgara gastamo.

Dum tiuj varmaj tagoj tie ĉi, en Varno, sur la bordo de Nigra Maro, en tiu ĉi Palaco de Sporto kaj Kulturo, en kiu ofte regas la bonfara spirito de pluraj emociigaj forumoj, vi kontaktos inter vi sen perantoj, vi pliriĉigos kaj plivastigos viajn ĉiufankajn ligojn kun multaj homoj el plej diversaj landoj, vi — sendepende de rasa, nacia, religia kaj politika aparteno — manifestos vian volon, ke ĉiuj homoj kaj popoloj sur la tero vivu en paco, en reciproka kompreniĝo kaj amikeco.

La ĉefa temo de via Kongreso, ĉerpita el la rekomendoj de UNESKO pri edukado en spirito de internacia kunlaboro, estas tre aktuala. El tiu temo vi prenis nur unu punkton: „Internacia lingvo — internacia edukado“, ĉar tio estas la esenco de la E-movado.

Mi estas profunde konvinkita, ke la traktado de tiu temo surbaze de la internacia E-movado donos al via Kongreso pli grandan nuntempan nuancon kaj celkonformecon. Tio estos via kontribuo al la solvo de la tuthomara tasko.

dum la 63-a UK de E-o, Kongreso, kiu eniros en la E-historion kiel unu el la plej amasaj kaj imponaj kongresoj. (Aplaŭdoj).

Nature, via Movado havos plej bonajn kondiĉojn por realigo de novaj sukcesoj tiam, kiam la homaro vivos en paco kaj sekureco, kiam ĝi forigos por ĉiam la militon kiel rimedon por solvo de internaciaj konfliktoj, kiam ĝi povos multigi la riĉaĵojn de la kulturo, kreitajn dum jarcentoj. Nur tiam movado kiel la via povos trovi pli grandan moralan kaj materialan apogon en nacia kaj internacia skalo.

Sendube, per E-o vi kontribuas al forigo de la malamo inter la popoloj, vi laboras por konservo de la paco kaj amikeco inter ili, por firmigo kaj evoluigo de la fido inter la homoj el la kvin kontinentoj.

Viaj tradiciaj kongresoj datigas ekde la komenco de nia maltrankvila jarcento. Inter la franca urbo Boulogne-sur-mere kaj la bulgara Varno ekzistas longa ora rozario de universalaj kongresoj. La rozarion rompis tragikaj eventoj — la du mondmilitoj, kiuj pereigis dekojn da milionoj da homoj kaj ruinigis enormajn materialajn kaj spiritaĵajn valoraĵojn.

Mi forte kredas, ke mi esprimas la volon de vi ĉiuj: „Neniam plu milito! Neniam plu homaj viktimoj kaj materialaj detruoj!“ Por ke la homaro povu vivi kaj krei en paco kaj ĝui la fruktojn de sia laboro! Por ke vi, la esperantistoj, povu okazigi viajn kongresojn en pacaj tagoj! (Aplaŭdoj).

La bulgara socio rilatas kun granda simpatio al la noblaj streboj de la e-istoj, ĉar en ilia personeco ĝi vidas sincerajn agantojn por reciproka interkompreniĝo en la mondo kaj por fruktodona kunlaboro inter la ŝtatoj sendepende de ilia sociordo.

La publikaj organizaĵoj, kiuj aktivas en la nomo de noblaj homaj celoj, devas etendi la manojn unuj al la aliaj. Por realigi tiujn celojn necesas ne nur la klopodoj de la sobre pensantaj ŝtatestoj, sed ankaŭ la larĝa subteno de la publika opinio, kiu ĉiam pli kaj pli estiĝas potenca faktoro.

Al vi certe estas konate, ke en tiu ĉi jaro nia popolo festis la 100-jaran datrevenon de sia liberigo el sub otomana jugo kaj en la proksimaj jaroj ĝi celebros la 1300-jaran datrevenon de la fondiĝo de la bulgara ŝtato. Nur tiuj du faktoj pruvas, kiom drameca estis la historio de Bulgario — historio de multjarcentaj bataloj por nacia sendependeco kaj libero, por politika kaj socia justeco.

Dum jarcentoj nia popolo manifestis viglan publikan opinion; ĝi kreis rimarkindan kulturon kaj netakseblan folkloran riĉaĵon. Dum la jaroj de la popola regado ĝi en la nomo de la homo, klopodas por la bono de la homo. Hodiaŭ la bulgara popolo okupas sin pri solvo de ekskluzive grava historia tasko — la konstruo de evoluinta socialisma socio. Por realigi la celon, kiun ĝi mem starigis antaŭ si, Bulgario bezonas daŭran pacon tiel, kiel ĉiu viva estaĵo bezonas la sunon kaj la aeron.

Inspirita de la nobla strebo al paco kaj progreso, nia popolo laboras kaj batalas por triumfo de mondo, liberigita de la nuklea fantomo, de la peza ŝarĝo de l'armado; mondo kun trankvila kaj serena ĉielo, mondo de paca konstrua laboro, en kiu la popoloj vivos en kondiĉoj de sekureco, interkompreniĝo kaj intima kunlaboro; mondo, en kiu la homoj povos vivi libere kaj en reciproka fido kaj ĝuos la fruktojn de la komuna materiala kaj spirita kulturo. Nova Bulgario estas ne nur lando de la bonodora rozo kaj turismo. Ĝi estas ankaŭ fidinda kaj firma gardanto de la paco kaj sekureco. Precipe tie ĉi, sur la Balkana Duoninsulo, kiu en la pasinteco ĝuis la renomon de „municiejo“, ĝi gvidas politikon de bonaj internajbaraj rilatoj kaj kunlaboro; ĝi faras ĉion eblan por konservi la spiriton de la Fina Akto de Helsinki.

(Daŭrigo sur p. 6)



ПРИВЕТСТВЕНО СЛОВО

на ПЕТЪР ТАНЧЕВ, първи заместник-председател
на Държавния съюз на НР България и председател
на Почетния комитет на 63-тия световен
есперантски конгрес

Уважаеми г-н председател на Световния есперантски съюз!

Драги конгресисти и гости!

Другарки и другари!

Госпожи и господа!

Радвам се, че имам честта от името на Държавния съюз и на Правителството на НР България, от името на българския народ и от мое име сърдечно да ви поздравя по случай откриването на 63-тия Световен есперантски конгрес.

Щастлив съм да ви предам горещите и най-сърдечни поздравии от държавния ръководител на Народна Република България Тодор Живков — голям приятел на есперантистите от цял свят, който високо цени международния език есперанто като език на мира и приятелството между народите. (Бурни ръкопляскания).

Искам да изразя своето голямо задоволство от факта, че през последните 15 години за втори път вие, представители на Европа, Азия, Латинска Америка, Африка и Австралия, се събирате в нашата страна, за да обсъждате проблемите и задачите на международното есперантско движение. Ние високо ценим вашето признание на дейността на българските есперантисти и приемаме това като висока чест за България, която утвърждава и поддържа делото на есперантистите. Надявам се, че и този път, в нашата черноморска красавица Варна, вие ще имате възможността да се убедите в традиционното и горещо българско гостоприемство.

През тези горещи дни тук, във Варна, на брега на Черно море, в този Дворец на спорта и културата, в който често владее благотворният дух на много вълнуващи форуми, вие ще общувате без посредници, ще обогатите и разширите вашите всестрани връзки с много хора от най-различни страни, ще манифестирате — независимо от расова, национална, религиозна и политическа принадлежност — вашата воля всички хора и народи по земята да живеят в мир, във взаимно разбирателство и приятелство.

Главната тема на вашия конгрес, изхождаща от препоръките на ЮНЕСКО за възпитание в дух на международно сътрудничество, е много актуална. От тази тема вие вземате само един пункт: „Международен език — международно възпитание“, понеже това е същността на есперантското движение.

Аз съм дълбоко убеден, че обсъждането на тази тема на базата на международното есперантско движение ще придаде на вашия конгрес по-значителен съвременен нюанс и целенасоченост. Това ще бъде вашият принос за решаването на общочовешката задача в 63-тия Световен есперантски конгрес, конгрес, който ще влезе в есперантската история като един от най-масовите и внушителни конгреси. (Ръкопляскания).

Естествено, вашето движение ще има най-добри условия за реализиране на нови успехи тогава, когато човечеството живее в мир и сигурност, когато то отхвърли завинаги войната като средство за решаване на международните конфликти, когато то ще може да увеличи богатствата на културата, създавани през столетията. Само тогава движение като вашето ще може да



намери по-голяма морална и материална подкрепа в национално и международно отношение.

Несъмнено, чрез есперанто вие допринасяте за отстраняване на враждата между народите, работите за запазване на мира и приятелството между тях, за затвърдяване и развиване на доверието между хората от петте континента.

Вашите традиционни конгреси водят началото си от първите години на нашето неспокойно столетие. Между френския град Булон-сюр-мер и българския град Варна съществува дълга златна броевица от световни конгреси. Броеницата е била прекъсвана от трагични събития — двете световни войни, които погубиха десетки милиони хора и превърнаха в развалини огромни материални и духовни ценности.

Аз твърдо вярвам, че изразявам волята на всички вас: „Никога повече война! Никога повече човешки жертви и материални разрушения!“ За да може човечеството да живее и твори в мир и да се наслаждава на плодовете на своя труд! За да можете вие, есперантистите, да организирате своите конгреси мирни дни! (Ръкопляскания).

Българската общественост се отнася с голяма симпатия към благородните стремежи на есперантистите, защото в тяхно лице тя вижда искрени дейци за взаимно разбирателство в света и за плодотворно сътрудничество между държавите независимо от техния социален строй.

Обществените организации, които действуват в името на благородни човешки цели, трябва да си подадат ръце. За да бъдат осъществени тези цели, са необходими не само усилията на трезво мислещите държавници, но също и широката подкрепа на общественото мнение, което все повече и повече става мощен фактор.

На вас е сигурно известно, че в тази година нашият народ чествува 100-годишнината от освободението си от отоманско иго и че в близките години той ще отбележи 1300-годишнината от основаването на българската държава. Само тези два факта доказват колко драматична е била историята на България — история на многовековни борби за национална независимост и свобода, за политическа и социална справедливост.

В продължение на столетия нашият народ е изявявал активно обществено мнение; той е създавал забележителна култура и неоценимо фолклорно богатство. През годините на народната власт той прави всичко в името на човека за доброто на човека. Днес българският народ се е заел с решаване на изключително важна историческа задача — построяването на развито социалистическо общество. За осъществяване на целта, която той сам си е поставил, България се нуждае от траен мир, както всяко живо същество се нуждае от слънце и въздух.

Вдъхновен от благородния стремеж към мир и прогрес, нашият народ работи и се бори за тържеството на свят, освободен от ядрената опасност, от тежкия товар на въоръжението; свят със спокойно и ясно небе, свят на мирен съзидателен труд, в който народите ще живеят в условия на сигурност, разбирателство и тясно сътрудничество; свят, в който хората ще могат да живеят свободно и при взаимно доверие и ще се наслаждават на плодовете на общата материална и духовна култура. Нова България е не само страна на ухаещата роза и туризма. Тя е и надежден и твърд защитник на мира и сигурността. Главно тук, на Балканския полуостров, който в миналото с и беше спечелил прозвището „барутен погреб“, тя води политика на добри междусъседски отношения и сътрудничество; тя прави всичко възможно за запазване духа на Заключителния акт на Хелзинки.

(Продължава на стр. 7)



HONORA KOMITATO DE LA 63-A UK DE ESPERANTO

akad. Angel Balevski — prezidanto de la Bulgara Akademio de Sciencoj
 Marij Ivanov — unua vicministro de la eksteraj aferoj
 akad. Kiril Bratanov — prezidanto de la Unuiĝo de Sciencaj Laboristoj
 Georgi Evtimov — prezidanto de la Komitato por Turismo
 akad. Pantelej Zarev — prezidanto de la Unuiĝo de Bulgaraj Verkistoj
 akad. Georgi Karaslavov — verkisto
 akad. Petro Dinekov
 Stanoj Jonev — prezidanto de la Urba Popola Soveto de Varno
 prof. Vasil Peevski
 prof. Georgi Dimitrov — rektoro de la Polekonomia Instituto en Varno
 patriarko Maksim
 Hristo Radevski — poeto

KONGRESA PREZIDANTARO

d-ro H. N. Tonkin — prezidanto de UEA
 prof. d-ro C. Støp-Bowitz — vicprezidanto de UEA
 mag. William Auld — vicprezidanto de UEA
 d-ro W. Bormann — ĝenerala sekretario de UEA
 prof. d-ro Vasil Peevski — rektoro de ISU
 Hristo Gorov — prezidanto de BEA
 Nikola Aleksiev — prezidanto de LKK

LOKA KONGRESA KOMITATO

Nikola Aleksiev — prezidanto, ŝtataj instancoj
 Hristo Gorov — vicprezidanto, financoj
 Nano Kjuĉukov — vicprezidanto, enlanda informado
 doc. Georgi Dimov — vicprezidanto, lokaj kontaktoj
 Violin Oljanov — ĝenerala sekretario
 Georgi Cvetkov — sekretario, nutrado
 Vasilka Petrova — kasistino
 Boris Popov — kasisto
 Kiril Drajev — artaj aranĝoj
 Dimitro Mutuŝev — ekskursoj
 Markrid Karajan — ekskursoj
 Asja Karajan — loĝigo
 Kina Haĝieva — loĝigo
 Petro Todorov — junularaj aranĝoj
 Donĉo Hitrov — gazetara servo
 Kunĉo Vălev — eldonaĵoj
 Krăstju Karucin — ĝiĉetoj
 Bogdana Popova — infankongreseto
 Todor Ŝoŝev — blindulaj aferoj
 Pavel Elenov — sona kaj filma registrado
 Georgi Dolapĉiev — revizoro
 Nikola Ĉonkov — revizoro
 Charles R. L. Power — Konstanta Kongresa Sekretario (KKS)

GAZETARAJ KONFERENCJOJ

Lige kun la antaŭstaranta 63-a UK de E-o okazis du gazetaraj konferencoj — la unua en Sofio, la dua — senpere antaŭ la Kongreso — en Varno. Ambaŭ konferencojn ĉeestis reprezentantoj de redakcioj de bulgaraj ĵurnaloj, radio kaj televido, ankaŭ eksterlandaj ĵurnalistoj, venintaj por la Kongreso.

La prezidanto de LKK Nikola Aleksiev konigis al la ĉeestantoj la programon de la Kongreso, pli detale kelkajn aparte gravajn aranĝojn.

La konferencojn partoprenis ankaŭ la prezidanto de UEA prof. d-ro Humphrey (prononcu Hâmfri) Tonkin. Li parolis pri la signifo de la internacia lingvo E-o kiel rimedo por reciproka konatiĝo kaj kompreniĝo inter la popoloj, por interŝanĝo de kulturaj, scienc-teknikaj kaj aliaj spertoj en la nuntempa mondo.

La konferencojn partoprenis ankaŭ membroj de LKK kaj de UEA.

Foto: L. Nikov



Plenplena vastega halo „Hodler“ en la Palaco de Sporto kaj Kulturo en Varno. Pli ol 4500 esperantistoj el pli ol 50 landoj de la kvin kontinentoj — reprezentantoj de ĉiuj rasoj de la terglobo. La plej universala el la Universalaj Kongresoj de E-o.

La prezidantaro okupas lokon sur la podio: la alta protektanto Petro Tanĉev — unua vicprezidanto de la Stata Soveto de Popola Respubliko Bulgario, prof. d-ro Humphrey Tonkin — prezidanto de UEA, Zahari Zahariev — reprezentanto de UNESKO, Stanoj Janev — prezidanto de la Urba Popola Soveto de Varno, la estraranoj de UEA d-ro Werner Bormann, prof. d-ro Carl Støp-Bowitz, Ursula Grattapaglia, Andrzej Pettyn, d-rino Flora Sabo-Felső, Gregoire Maertens, la prezidanto de la Akademio de Esperanto prof. Gaston Waringhien, la direktoro de la Centra Oficejo de UEA d-ro Victor Sadler, la prezidanto kaj la vicprezidanto de LKK Nikola Aleksiev kaj Hristo Gorov.

Eksonas solene la himno. La impona ĉeestantaro ekstaras. Regas profunda sento de internacia amikeco kaj humanismo.

Per arda emociiga parolado d-ro Tonkin deklaras la Kongreson malfermita.

Sincere bonvenigas la kongresanojn la prezidanto de LKK N. Aleksiev.

La alta protektanto P. Tanĉev faras imponan salutparoladon, transdonante al la kongresanoj la varmajn salutojn de Todor Jivkov, la ŝtatestro de Bulgario.

Post muzika paŭzo la Kongreson salutas Stanoj Janev — prezidanto de la Urba Popola Soveto de Varno. Zahari Zahariev prezentas la mesaĝon de s-ro Amadou Mahtar M'Bow — ĝenerala direktoro de

UNESKO, en kiu li tre alte taksas la laboron de la e-istoj kiel „pioniroj de internacia kunlaboro, kiu malfermas novajn vojojn al dialogoj inter la popoloj kaj inter la kulturoj“. Konsize prezentas la ĉeftemon de la Kongreso „Internacia lingvo — internacia edukado“ la estrarano Andrzej Pettyn.

Krom Bulgario 12 ŝtatoj sendis al la Kongreso siajn reprezentantojn, kiuj salutis aŭ nur ĉeestis la inaŭguron:

Aŭstrio: Salutis en E-o d-ro D. Bukovski, ambasadoro.

Ĉeĥoslovakio: Salutis d-ro Anton Kamenicki, ĝenerala konsulo, kaj ĉeestis s-ino Vankova el la Ministerio de Kulturo.

Cina Popola Respubliko: Salutis la politika konsilanto s-ro Baj.

Danlando: Salutis s-ino Kirsten Madsen, aferŝarĝito.

Germana D. R.: Ĉeestis la ĉefkonsulo s-ro H. Hanisch.

Hungario: Ĉeestis s-ro László Virág, kultura ataŝeo.

Korea D. R.: Salutis la kultura ataŝeo s-ro Z. P. Rjol.

Norvegio: En la nomo de sia registaro salutis kapitano R. Bugge-Paulsen.

Pollando: Salutis la ĉefkonsulo s-ro Marek Zbik.

Sirio: Salutis la ambasadoro, s-ro Raŝed Kelani.

Sovetio: Ĉeestis la unua sekretario de l'ambasado V. I. Kijaŝko.

Svislando: Salutis da dua sekretario kaj konsulo s-ro L. Renggli.

La solena inaŭguro finiĝis per parolado de d-ro Tonkin. Regis alta entuziasmo kaj kor-tuŝo.

Estimataj kongresanoj kaj gastoj,

Mi kredas, ke via restado inter ni, en nia lando, donos al vi plenan ideon pri nia laborema kaj liberama popolo, pri nia multjarcenta kulturo, pri nia nuntempa socia sistemo kaj grandaj atingoj en ĉiuj sferoj de la vivo. Paralele kun tio, ni esperas, ke el Bulgario vi forportos rememorojn pri unu renaskiĝinta lando, pri popolo konstruanto, kiu varme deziras pacon kaj batalas por sia feliĉa vivo en paco, kunlaboro kaj interkompreniĝo kun la popoloj de la tuta planedo.

Al ĉiuj kongresanoj kaj gastoj de la 63-a Universalaj Kongreso de E-o mi elkore bondeziras fruktodonan laboron!

Agrablan restadon sur nia sunplena nigramara bordo, en tiu bela angulo de socialisma Bulgario! (Tondraj longedaŭraj aplaŭdoj).



SALUTPAROLADO

de prof. d-ro HUMPHREY TONKIN, prezidanto de UEA

Bonvenon al la 63-a Universala Kongreso de E-o!

La karaktero de niaj kongresoj varias. Jen ni troviĝas en Ateno, lulilo de la okcidenta kulturo, jen en Tokio, unu el la orientaj ĉefurboj, jen ni troviĝas en suda Madrido, jen en norda Rejkjaviko. Ĉi-jare la Kongreso ankaŭ havas sian apartan karakteron. Unue, ĝi estas amasa Kongreso. Se oni esceptas nur Nurnbergon en 1923, la ĉi-jara Kongreso estas la plej amase vizitita en la tuta historio de la Internacia Lingvo. Ĝis nun aliĝis al ĝi pli ol 4400 homoj el pli ol 50 landoj.

Due, la Kongreso ĉi-jare pritraktos la edukadon — ne nur la lernejan, sed precipe la dumvivan edukadon — kaj la rolon de E-o kiel rimedo por la internacia kompreniĝo.

Trie, la Kongreso havas aparte riĉan kulturan programon. Tio indas, ĉar la nura grandeco de la Kongreso donas al ni bonajn eblecojn ĝui kaj antaŭenigi nian kulturon. Ni memoru, ke kvankam ni venis ĉi tien por labori, ni ankaŭ venis por utiligi nian lingvon. La simpla ĉeesto de tiom da parolantoj de la Internacia Lingvo en sama loko kaj en sama tempo donas nemezureblan impulson al nia lingvo kiel kultura fenomeno, ĉar la lingvo uziĝas, streĉiĝas, estas pli profunde lernata.

Sed tiuj ĉi loko kaj tempo estas

ankaŭ specialaj. Ni festas ĉi-jare tri datrevenojn. Guste antaŭ cent jaroj, la 3-an de marto 1878, subskribiĝis la packontrakto de San Stefano, kiu donis al la bulgara popolo ĝian sendependecon. Ni gratulas niajn bulgarajn geamikojn kaj ĝojas, ke ni troviĝas en ilia lando dum tiu ĉi festa periodo.

Antaŭ 70 jaroj okazis evento aparte kara al ĉiuj, kiuj ĉeestas la nunan Kongreson: en 1908 fondiĝis la unua plene internacia E-asocio, la Universala E-Asocio, kiu ĉi-jare kunvokas la nunan Kongreson. Ni rajtas fieri pri tiu ĉi historio, pri nia asocio, pri la kunlaboro por la ideo de la Internacia Lingvo.

Antaŭ 30 jaroj estis subskribita la Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj. Ĝi fariĝis unu el la bazaj gvidaj dokumentoj por la laboro de UEA. Ni gratulas al la Unuiĝintaj Nacioj, al UNESKO kaj al la tuta familio de organizaĵoj de Unuiĝintaj Nacioj, kun kiu ni tiel intime kunlaboras kaj kies idealojn ni povas antaŭenigi.

Tri datrevenoj: por Bulgario, por la parolantoj de Esperanto, por la tuta homaro. . . En tiu festa atmosfero kaj antaŭ unu el la plej amasaj manifestiĝoj de la potenco de E-o en ĝia tuta historio, en la nomo de vi ĉiuj, mi malfermas la 63-an Universalan Kongreson de E-o.

Уважаеми конгресисти и гости,

Аз вярвам, че вашето пребиваване сред нас, в нашата страна, ще ви даде пълна представа за нашия трудолюбив и свободолюбив народ, за нашата многовековна култура, за нашата съвременна обществена система и големи постижения във всички сфери на живота. Наред с това ние се надяваме, че от България вие ще отнесете спомен за една обновена страна, за народ-строител, който горещо желае мир и се бори за своя щастлив живот в мир, сътрудничество и разбирателство с народите от цялата планета.

На всички конгресисти и гости на 63-тия Световен есперантски конгрес сърдечно пожелавам плодотворна работа!

Приятно прекарване на нашия слънчев черноморски бряг, в този красив кът на социалистическа България! (Бурни продължителни ръкопляскания).



Ne povante alparoli vian Kongreson, kiel mi faris la pasintan jaron en Rejkjaviko, mi deziras direkti al vi, en mia propra nomo kaj ankaŭ en la nomo de la organizo, kiun mi estras, mian plej koran saluton.

UNESKO ekkonos la konkludojn de viaj debatoj kun des pli da interesiĝo, ke la kongrestemo, dediĉita precipe al la internacia edukado, tuŝas plurajn demandojn, kiuj estas ankaŭ inter ĝiaj propraj zorgoj: edukado al la plenaĝuloj, plibonigo de la instruprogramoj por la Tria Mondo, la Rekomendo de la Ĝenerala Konferenco de UNESKO pri edukado por internaciaj kompreniĝo, kunlaboro kaj

paco kaj edukado rilate al la homaj rajtoj kaj fundamentaj liberecoj.

Tiel vi pretiĝas por apliki en la eduka kampo tiun serĉadon de unu *komuna lingvo* — en propra kaj figura sencoj —, kiu estas la ekzistokialo mem de la Universala E-Asocio. Kun plej laŭdinda persistemo vi faris vin pioniroj de internacia kunlaboro, kiu malfermas novajn vojojn al dialogo inter la popoloj kaj inter la kulturoj. Miaj plej varmkoraj kuragiĝoj akompanas vin ĉe tiu ĉi nobla tasko, kaj mi esprimas la deziron, ke vian laboradon kronu la plena sukceso, kiun ĝi meritas.

Solena inaŭguro

FERMAJ VORTOJ

de d-ro H. TONKIN

Karaj gekolegoj!

Ni nun venas al la fino de la unua parto de niaj malfermaj solenaĵoj. Dum la posttagmezo venos la dua parto, kiam ni aŭdos la salutojn de la landaj reprezentantoj kaj informiĝos pri la nuna stato de UEA kaj la E-movado.

Finante la nunan kunvenon, mi tamen deziras emfazi, precipe por niaj gastoj, la celojn de nia agado kaj la vojon, laŭ kiu ni direktas nian energion. La kunveno ĉi-matene ne similas aliajn internaciajn kunvenojn: ĝi okazas sen la interveno de tradukistoj kaj interpretistoj, ĝi okazas en spirito de plej profunda harmonio. Kvankam neniu saĝa parolanto de E-o asertus, ke la nura utiligo de E-o kreas harmonion, ekzistas nenia dubo, ke la diverseco de la lingvoj en la internacia sfero grave malhelpas la internacian kunlaboron. Ankaŭ neniu saĝa parolanto de E-o asertus, ke la nura ekuzo de unu lingvo por internacia agado aŭtomate metus nutraĵon en la stomakojn de tiuj, kiuj malsatas, aŭtomate resanigus tiujn, kiuj suferas pro plej teruraj mals-

noj, aŭtomate alfabetigus tiujn, kiuj ne scias legi aŭ skribi. Sed la utiligo de unusola lingvo por la internaciaj kontaktoj inter la homoj ebligus ilin finfine fronti rekte kaj senŝancele tiujn demandojn. La lingva problemo ne estas samnivela problemo kiel la problemo de malsato aŭ malsano, aŭ analfabeteco, aŭ la demando pri milito kaj paco, sed la solvo de la lingva problemo estas unu el la antaŭkondiĉoj de la solvo de tiuj aliaj urĝaj problemoj de la homaro.

Kaj kiel solvi la lingvan problemon? Ĉu per utiligo de unu sola *racia* lingvo en la internacia sfero? Iri tiun vojon signifus redukti al duaklaseco ĉiujn, kiuj ne denaske regas tiun lingvon. Ĝi estus rekta lingva diskriminacio, same koroda al la animo kaj la materia stato de la homoj kiel la rasismo kaj seksismo. La ĝisnunaj spertoj montris, ke kvankam la lernado de fremdaj lingvoj estas grava elemento en la internacia edukado, ĝi postulas grandegajn investojn kaj ne ĉiam estas sukcesa.

Antaŭ vi troviĝas la fenomeno de E-o — racia alternativo al la lukto



de la lingvoj. Nia asocio estas preta helpi pri la enkonduko de E-o en la internacian agadon. Ni forigu, unu fojon por ĉiam, la lingvan barieron en la internacia socio. Tio estas nia

celo.

Mi dankas al vi ĉiuj pro via ĉeesto!

Mi dankas al vi, Varno!

Mi dankas al vi, Bulgario!

Mi dankas al vi, Esperanto!

MALFERMO DE LA 63-A UNIVERSALA KONGRESO

Post muzika enkonduko de blovorkestro el urbo Târgoviște (Bulgario) la vizprezidanto de UEA prof. d-ro C. Støp-Bowitz bonvenigis la ĉeestantojn.

La unua ero en la programo estis saluto de la Infana Kongreseto. La infanoj pretermarŝis la podion svingante E-flagetojn. Ekstarinte antaŭ la prezidantaro ili unuope kaj kune recitis kaj kriis salutojn al la kongresanoj.

Salutis la Kongreson en bulgara lingvo akademiano Kiril Bratanov, reprezentanto de la Monda Federacio de Sciencistoj kaj membro de la Honora Komitato de la 63-a UK.

Poste d-ro Victor Sadler, direktoro de la Centra Oficejo de UEA, invitis por salutoj la reprezentantojn de landaj asocioj. Ĉi-jare la reprezentantoj estis escepte multnombraj:

a) 31 aliĝintaj landaj asocioj: Argentino, Aŭstralio, Aŭstrio, Belgio, Brazilo, Britio, Bulgario, Ĉeĥoslovakio, Danlando, Finnlando, Francio, Germana DR, FR Germanio, Greklando, Hispanio, Hungario, Irlando, Islando, Izraelio, Italio, Japanio, Jugoslavio, Kanado, Luksemburgo, Nederlando,

Norvegio, Nov-Zelando, Pollando, Svedio, Svislando, Usono.

b) 9 nealiĝintaj landaj asocioj: Armenio, Ĉina PR, Madagaskaro, Peruo, Portugalio, Rumanio, Sovetunio, Venezuelo, Vjetnamio.

c) 2 aliaj landoj: Burundio, Egiptio.

Notinda estis la saluto de la islanda reprezentanto, farita en poezia formo. La novzelanda reprezentanto salutis en la nomoj de la ĉefministro kaj de la estro de la opozicio.

Estis multaj skribitaj salutmesaĝoj sed d-ro Sadler legis nur tiujn de la landaj asocioj de Ĉilio, Kubo kaj Hispanio kaj kelkajn individuajn.

S-ro Menabene mallonge prezentis la laboron de la Interparlamentara Grupo „Amikoj de E-o“ kaj salutis en ĝia nomo. Todor Soŝev salutis la Kongreson en la nomo de la 46-a Kongreso de la Blindaj E-istoj, kaj d-ro Phersy — en la nomo de IFEF. Dum muzika paŭzo vokala trio kantis „La vojon“, teksto de d-ro L. L. Zamenhof, muziko de Jordan Kolev.

La malfermo finiĝis per parolado de d-ro Tonkin.

DISKUTGRUPOJ PRI LA KONGRESA ĈEFTEMO „INTERNACIA LINGVO — INTERNACIA EDUKADO“

Diversaj facetoj de la kongresa ĉeftemo „Internacia lingvo — internacia edukado“ estis diskutitaj en pluraj grupoj: memlernado, studrondoj, korespondaj kursoj, eksterlernejaj kursoj, varbado al kursoj, novaj parolantoj, plenaĝuloj, afrikaj problemoj.

Diskutgrupo „Memlernado“

Ceestis 35 personoj. Sub la gvido de B. Moon (L) oni diskutis pri la aspektoj kaj problemoj de la temo kaj konkludis, ke estas necese antaŭvidi taŭgajn materialojn facile haveblajn kaj diversmaniere apogi memlernantojn.

Diskutgrupo „Eksterlernejaj kursoj“

Estis skizita la situacio en 6 landoj kaj proponita jeno:

Por helpi al eksterlernejaj kursoj necesus organizi (pere de UEA) eksterlandan prelegvojaĝon, minimume 1 fojon jare, subteni eldonon de libroj en simpligita E-o, distingi inter lernejoj kaj eksterlernejaj kursoj, (liriĉigi la enhavon de la lastaj per ĉio ebla pludoj, premioj, ktp.).

Diskutgrupo „Varbado al kursoj“

Parolis 6 diverslandaj partoprenantoj. La konkludoj estis:

Varbadon ĉiam anticipu informado. Ĝi estu kiel eble celtrafa kaj konsideru la realajn eblecojn. Necesas manlibro, eldonita de UEA, por kontraŭbatali la argumentojn de eksteruloj. Dum la informado kaj varbado oni turnu pli da atento al la nobla, eksterlingva valoro de E-o, ĉar lastatempe multaj deziras labori por io luktinda.

Diskutgrupo „Novaj parolantoj de E-o“

Ceestis ĉirkaŭ 60 personoj, el kiuj 10 partoprenis en la diskutoj. Ili inter alie instigis al jeno:

— Komence de la kurso oni sufiĉe informu pri la Movado kaj pri E-o.



— Oni zorgu pri la kursfinintoj, aranĝante por ili bonvenigan vesperon en loka klubo, en kiu oni enmanigu atestojn al ili kaj feste prezentu ilin al la klubanoj.

— En la kluboj oni parolu ĉiam E-on, sed kun novuloj klare kaj kuraĝige. Oni donu al novuloj konvenajn taskojn, por ke ili sentu sin utilaj.

Samtempe kun apartaj klubvesperoj por novuloj kaj flue parolantaj anoj oni aranĝu ankaŭ komunajn vesperojn. Bona klub-vespero devas enhavi programon, ekz. prelegon, rakontadon kun diapozitivoj aŭ sonmaterialo. Oni klopodu aranĝi klubvesperojn tiel, ke ili diferencu de kursvesperoj; en la klubo oni havu pli festan ĉeestadon. Oni turnu sin ankaŭ eksteren, aranĝante kunvenojn por neesperantistoj. Ekskursaj gastoj kaj gastprelegantoj estas bonvenaj kaj instigaj.

— Indus sondi la motivojn de la kursanoj: sufiĉe grava celo, ekz. ekskurso eksterlanden, vojaĝo al UK, preparo de belarta programo ka. helpas, ke la kursanoj pli firme ligu al la studado kaj al la Movado.

Diskutgrupo "E-o kaj pli aĝaj personoj"

La rubrikoj, prezentitaj ĉi-sube, estas konformaj al la proponoj en la artikolo de redaktoro Andrzej Pettyn, estrarano pri edukado. (Vd. revuon „*Esperanto*“, n-ro 5/1978, pĝ. 92 kaj 93). La demandoj numeritaj servis por funkciigi la diskutadon en la grupo.

A. E-o kiel agrabla kaj utila „tempo-pasigilo“

1. Ĉu ni rigardu E-on kiel „tempo-pasigilon“?
2. Ĉu pensiulo nepre estu homo „ekster la pulsanta vivo“?
3. Kion pozitivan povus doni E-o al pliaĝuloj?

Psikologiaj aspektoj

1. Ĉu pli aĝaj personoj kapablas lerni novan lingvon?
2. Kiel ni povu rekompensi tion, kion pensiuloj perdis, ne havante eblecon studi fremdajn lingvojn en la lernejoj?
3. Kiel ŝanĝi eventualan pesimismon je optimismo inter pliaĝuloj?

C. Kion pensiuloj ne faras, sed povus fari por la Movado, konsidere al la libera tempo, pri kiu ili disponas?

1. Ĉu la Movado prezentas konkretajn taskojn al la jam multjaraj e-istoj-pensiuloj?
2. Kian praktikan kaj utilan laboron povas tiuj pensiuloj (multaj en la Movado) fari: a) en lokaj societoj; b) en la landaj asocioj?
3. Ĉu jam spertaj E-instruistoj (kursgvidan-

toj) povas agadi por allogi pli aĝajn personojn lerni E-on?

Ĉ. Kion la Movado povus doni al pensiuloj ene de la Movado kaj ekster ĝi?

1. Ĉu nia Movado estas preta doni faciligojn al nunaj kaj novaj e-istoj-pensiuloj? Kion vi opinias?
2. Kiel oni motivigu pli aĝajn personojn lerni E-on?
3. Ĉu vi opinias, ke pensiuloj povus ŝati kaj utiligi la eblecojn per E-o ekhavi translimajn kontaktojn kun samaĝuloj-pensiuloj (korespondado, intervizitoj, organizita interŝanĝo de informoj pri la kondiĉoj de pensiuloj kaj pri la funkcio de iliaj organizaĵoj, presorganoj ktp)?

E. Kiel instrui E-on al pli aĝaj personoj?

1. Kion vi opinias pri la ebleco starigi instruadon de E-o inter pensiuloj de via urbo/loĝloko?
2. Kian metodon vi rekomendus? Ĉu rektan metodon? Kutiman lernolibron?
3. Preferindaj certe estus kursoj, kiuj povus okazi dum tagaj horoj (ne vesperkursoj), ĉu ne? Kion vi opinias?

La kunvenon pri tiu ĉi temo ĉeestis 45 personoj. Ili decidis atentigi pri jeno: — Ni protestas kontraŭ la esprimo „tempo-pasigilo“, kiam oni parolas pri E-o por pli aĝaj personoj.

— La grupo petus la Estraron de UEA studi ĉiun eblecon favori pensiulojn e-istojn per pli malaltaj kotizoj: a) por Universalaĵ Kongresoj; b) rilate jarkotizojn de UEA.

Diskutgrupo „Esperanto-Instruaj perspektivoj kaj problemoj en Afrikō

Sub la prezido de Eugene Raveloson, ĝenerala sekretario de la sekcio de Internacia Ligo de Esperantistoj-Instruistoj (ILEI) en Madagaskaro, partoprenis 9 personoj el 7 landoj.

Post iom da diskutoj estis akceptitaj jenaj rekomendoj:

1. UEA kaj ILEI petu UNESKON rekomendi al ĉiuj ŝtatoj-membroj solvi la analfabetecon en Afriko ankaŭ per E-o.
2. UEA kaj ILEI paralele pretigu instrumaterialon.
3. UEA kaj ILEI dediĉu grandan atenton al la informado.
4. UEA starigu afrikan oficejon ie en Afriko sub la kontrolo de la CO en Roterdamo.
5. UEA dediĉu en la revuo „*Esperanto*“ apartan paĝon por la diversaj informoj rilate al E-agado en Afriko kaj al la evoluo de la planitaj laboroj.
6. UEA decidu, ke la gvidanto de Afriko estu mem el tiu kontinento, ĉar afrikanoj plej bone konas la tieajn problemojn.



Unua kunveno

La unua ĝenerala kunveno de UEA okazis en la plej granda kongreshalo „Hodler“ en la ĉeesto de miloj da kongresanoj. Nura punkto de la tagordo estis la Raporto de la Estraro pri la agado de UEA dum 1977/78.

Estis traktitaj multaj problemoj el la varia agado de la monda E-organizo: administraj demandoj, financoj, institucio „Hodler“, revuo „Esperanto“, Uniersalaj Kongresoj, informaj servoj, internaciaj ligoj, kulturaj kaj edukaj problemoj, la Movado en apartaj landoj kaj branĉoj de la vivo, problemoj de la E-junularo, esploro kaj dokumentado ka.

Okazis viglaj diskutoj. Dekoj da kongresanoj esprimis opiniojn pri la estonta agado de UEA. La Estraro trastudos atente la proponojn.

Dua kunveno

Antaŭ pli ol mil kongresanoj same en la halo „Hodler“ okazis la dua ĝenerala kunveno de UEA, dediĉita plene al la kongresatemo „Internacia lingvo — internacia edukado“. Prezidis estrarano A. Pettyn (Pollando). Estis sumita la laboro de la 10 studrondoj, kiuj havis siajn laborkunvenojn dum la antaŭaj kongresaj tagoj. La gvidantoj de la grupoj raportis pri la faritaj rekomendoj kaj konkludoj. Okazis novaj debatoj precipe pri la temo „Kiel utiligi E-on por pliriĉigi la ĝeneralan klerigadon kaj edukadon“, tiel realigante la „Rekomendon de UNESKO pri edukado“. Oni proponis, ke tiu valora materialo pri la kongrestemo aperu ankaŭ broŝurforme, estu havebla por ĉiuj dezirantoj. Ĝi estos ege utila en nia informa kaj instrua laboro.

FAKAJ KUNVENOJ

Internacia Sciencista Asocio Esperantista (ISAE)

La kunveno de ISAE okazis sub la gvido de ĝia nova prezidanto — prof. S. Kavamura el Japanio.

En la tagordo estis: salutvortoj de la nova prezidanto de ISAE, prezento de la ĉeestantaj membroj de la estraro, raporto pri la agado de la Asocio dum 1977/78 j. fare de la ĝenerala sekretario J. Kavka. Oni tralegis la kasraporton de la malnova prezidanto prof. Boĵa Popoviĉ. Estis diskutitaj ankaŭ demandoj lige kun la eldonado de „Scienca Revuo“.

La sekvan tagon en la Internacia Domo de Sciencistoj „Jolio Kjuri“, troviĝanta sur la marbordo ekster la urbo, okazis renkontiĝo de sciencistoj-kongresanoj kun la ripozantaj tie bulgaraj sciencistoj. En la grupo de kongresanoj, ĉ. 30 personoj, estis profesoroj Støp-Bowitz, Neergard, de Smet, Peevski, Kawasaki ka. La grupon afable renkontis prof. Sendov — rektoro de la Sofia Universitato „Kliment Ŭridski“. Dum lunĉo akademiano Kiril Bratanov, vicprezidanto de la Monda Federacio de Sciencistoj, konigis al la gastoj la celojn kaj la taskojn de la Monda Federacio. Prof. Peevski faris la samon rilate la Unuiĝon de la Bulgaraj Sciencistoj. La tuta renkontiĝo pasis en sincera amika atmosfero.

Internacia Ligo de Esperantistoj-Instruistoj (ILEI)

La kunvenon de ILEI partoprenis 130 personoj. Prezidis Johan Iugusz (Hungario), vicprezidanto de ILEI.

En la nomo de la Ministerio de Popola Klerigo de PR Bulgario la kunvenintojn varme salutis Nikola Makariev.

E. Raveloson el Madagaskaro raportis pri la okazonta en 1979 internacia konferenco de ILEI en tiu lando. La konferenco traktos la problemojn pri disvastigo de E-o en la lernejoj de afrikaj landoj.

I. Pelis informis pri la preparlaboroj por la XII Internacia Konferenco de ILEI, kiu okazos en Goricia (Italio) je 17—28 de aŭgusto 1978.

La kasisto de ILEI Ole Olson alvokis la landajn sekciojn de ILEI esti pli akurataj kaj regulaj al sia internacia organizo.

En la diskutoj oni sugestis, ke estonte la konferencoj de ILEI okazu semajnon antaŭ la UK de UEA, prefere en la sama aŭ tute proksima lando. Tio grave faciligos al la membroj partopreni ambaŭ aranĝojn.

Monda Turismo

La temo de la kunveno, kiun gvidis mag. A. Grzebowski (Gjembovski), estis „Disvastigo de E-o en la internacia turismo“. La estrarano de UEA pri faka agado, prof. Støp-Bowitz, salutis la kunvenon kaj substrekis la gravan laboron de Monda Turismo. G. Maertens, estrarano pri financoj de UEA, menciis, ke MT estas unu el la plej aktivaj fakaj asocioj, kaj substrekis, ke pere de E-vojaĝoficejoj oni povas akiri monrimeadojn por la Movado.

Multaj sugestoj venis de la aŭskultantaro, i. a. pri kunlaboro kun Pasporta Servo de TEJO, eldono de turisma terminaro, kursoj de E-o por gvidistoj kaj ĉiĉeronoj, ka.

Internacia Unuiĝo de la Esperantistoj-Filologoj

Ĉirkaŭ 90 personoj, el kiuj 11 partoprenis en la debato, ĉeestis la kunvenon de IUEF kun la temoj „Ritmo kaj rimo en la E-poezio“ de Boris Tokarev (USSR), kaj „Pliriĝigo kaj evoluo de Esperanto“ de Fr. Lo Jakomo (F). Informon pri la agado de IUEF faris la prezidanto Violin Oljanov (Bg).

La kunvenon prezidis Kunĉo Vălev (Bg), vicprezidanto.

Ornitologia Rondo Esperantlingva (ORE)

Sonbende la prezidanto de ORE, s-ro W. Chandler el Aŭstralio, salutis la partoprenantojn. La kunveno aprobis la finanĉan raporton kaj plian kunlaboron kun Fondaĵo Monda Alternativo — internacia organizo, kies celo estas defendi la homan medion. Ĝi lanĉis tuteŭropan kampanjon kontraŭ la amasa ekstermado de birdoj, precipe en Italujo. La menciita organizo aplikas nuntempe vastskale E-on dank' al la laboro de ORE. Okazis detala diskuto pri la solvo de la financaj problemoj de ORE pro transpagaj malfacilaĵoj.

Mondpaca Esperantista Movado (MEM)

La Mondpaca Esperantista Movado celebris la 25-an datrevenon de sia fondo. Okazis publika kunveno kun ĉ. 500 ĉeestantoj.

Solenan paroladon faris Nikola Aleksiev — prezidanto de MEM. Diverslandaj kongresanoj prezentis salutojn. Kanĥoro de sofiaj e-istoj plenumis malgrandan koncerton.

Internacia Fervojista Esperanto-Federacio (IFEF)

La kunvenon prezidis Georgi Dolapĉiev — prezidanto de la bulgara sekcio de IFEF. D-ro F. Phersi raportis pri la kongreso de IFEF en Romo kaj pri financaj problemoj en iuj landoj.

La pli ol 100 fervojistojn salutis nome de UEA d-ro Støp-Bowitz, substrekante, ke IFEF estas la plej aktiva faka asocio de UEA.

Komputistoj kaj komputilistoj

Post unuhora diskutado inter 20 interesitoj fondiĝis grupo de komputistoj kaj komputilistoj. Ili decidis aperigi unuapaze regulan cirkuleron, kiu servu kiel faka ligilo inter la membroj kaj kiel tribuno por publikigo de fakaj artikoloj. Prioritaton oni donos komence al materialo, kiu rilatas iel kaj al E-o kaj al la komputiloj samtempe. Interesitoj adresu sin al *Antal Münnich, Szabolcska ut. 4/b, H-1025 Budapeŝt, Hungario*.

Internacia Ligo de Agrikulturaj Specialistoj Esperantistoj (ILASE)

Temo de la kunveno estis la agadraporto de la estraro. Ĝin legis la prezidanto de la Ligo, agr. ing. Šterju Kukuŝev (Bg). Ĉeestis 70 agrikulturaj specialistoj. Dum la sekvantaj 5 jaroj la Ligo intencas eldoni ĝeneralan, ĝardenistan kaj abelbredistan vortarojn, adresaron kaj propagandbroŝurojn en E-o. Prof. Bøwitz proponis aliĝon de ILASE al UEA. La estraro de ILASE pritraktos tiun proponon.

Fine okazis prelego de ing. Chomko el Pollando pri instruado en Agrikultura Mezlernejo Televida.

Universala Medicina Esperanto-Asocio (UMEA)

Sub gvido de la honora prezidanto de UMEA 100 personoj povis aŭdi la jarraporton de la asocio fare de d-ro I. Ferenczy (H), sekretario de UMEA. D-ro Shinoda disdonis UMEA-premion al 6 medicinistoj pro gravaj meritoj. Viglan agadon respegulis la jarraporto. UMEA okazigos internacian medicinistan konferencon venontjare en Hungario.

Estis elektita nova estraro kun prezidanto d-ro S. Kato (J). Ĝenerala sekretario iĝis d-ro S. Samazoe (J) kaj sekretario — d-ro I. Ferenczy (H).

Krome: ĉ. 50 medicinistoj vizitis la Instituton pri Higieno kaj Sano en Varno.

Internacia Ligo de Esperantistoj Foto-Kino-Magnetofon-Amatoroj (ILEF)

En la ĉeesto de pli ol 70 personoj okazis la ĝenerala konferenco de ILEF. Partoprenis kelkaj el la plej viglaj entuziasmoj pri tiuj modernaj rimedoj de interkontaktoj. Kun intereso ili aŭskultis raporton pri la ĝisnuna agado fare de la ĝen. sekretario Donĉo Ĥitrov (Bg). Li parolis pri la gravaj taskoj, kiuj staras antaŭ la membroj de la organizo — konservi por la estontaj generacioj valorajn filmajn, fotajn kaj magnetofonajn dokumentojn.

Per unuanima balotado estis elektita nova estraro: prezidanto Donĉo Ĥitrov (Bg), ĝenerala sekretario Wim M. A. de Smet (Belgio), gvidantoj de la sekcioj: „Foto“ — Hallgrimur Saemundson (Islando), „Kino“ — ing. Ognjan Keremidĉiev (Bg) kaj sekretario-kasistino Daniela Deĉeva (Bg).

La konferencon salutis prof. Støp-Bowitz, vicprezidanto de UEA, kiu bondeziris fruktodonan estontan laboron kaj proponis, ke ILEF aliĝu al UEA.

Post la fermo estis projekciitaj esperantaj amatoraj filmoj.



Muzika Esperanto-Ligo

La kunvenon de la Ligo sub la gvido de ĝia prezidanto prof. St. Ĝuĝev ĉeestis ĉ. 100 personoj. Gi estis malfermita per nelonga programo de la kanthoro de la Sofia E-societo „Maksim Gorkij“ sub la direktrado de Dimitro Terziev. Kantis ankaŭ Marija Angelova.

Dum la diskutado post la raporto de la estraro oni faris multajn utilajn proponojn kaj rekomendojn pri vastigo kaj plua stabiligo de la Ligo, pri ellaboro kaj aperigo de E-muzika vortaro ka.

La nova estraro estas same sub la prezidanteco de prof. d-ro Stojan Ĝuĝev (Bg).

Nova E-asocio de juristoj

Enkadre de la UK okazis fonda kunveno de E-asocio de juristoj. Elektita estraro de la nova asocio: Genĉo Genĉev (Bg), L. Ohuĝinn (Kanado), B. Zaborski (Pl). La estraro ricevis la taskon prepari projekton de statuto de la asocio, kiun oni traktos en la 64-a UK en Lucerno.

La juristoj-esperantistoj estas alvokitaj membri en la nova asocio, kiu kunlaboros al UEA.

Internacia Ligo de Esperantistoj Radioamatoroj (ILERA)

ILERA kunvenis dum 4 horoj sub la prezido de Edward Lindberg (Usono) kaj priparolis diversajn problemojn de sia agado. Estis malŝargita la prezidanto kaj fondita laborgrupo, kiu gvidos la asocion. La komisiono pri statuto daŭrigos sian agadon kaj uzos kiel modelon la statuton por fakaj asocioj de UEA. La kunvenon ĉeestis 22 personoj, el kiuj la duono estis membroj de la Ligo.

Internacia Asocio de Esperantistoj Matematikistoj (IADEM)

Jarkunveno de IAdEM okazis sub la prezido de Gerard Cool (Svislando), vicprezidanto. Oni diskutis surbaze de anticipe disdonita raporto. La kasisto Fr. Lo Jakomo (F) raportis pri la financa stato.

Okazis ankaŭ dua kunveno. En ĝi, prezentante konkretan terminologian problemon G. Cool enkondukis diskuton pri la celoj de nia terminologia agado kaj la agadmanieroj al tiuj celoj: kian terminaron eldoni; kiel kunordigi la diskutadon pri taŭgeco de terminoj; laŭ kiuj kriterioj oni decidu pri taŭgeco de terminoj ka. Tiun liberan diskuton ne sekvis formalaj decidoj.

Ce la fino de la kunveno prof. Frank (D) raportis pri la nuna stato de esperantigo de la matematika terminaro de Meschkowski.

Internacia Poŝtista kaj Telekomunikista E-Asocio (IPTEA)

Prelegis la prezidanto de IPTEA Draguŝko Petrov (Bg) pri la agado, kaj Veiko Mäkiluopa el Finnlando pri la teknika progreso en la telekomunikado. Estis elektita nova estraro de IPTEA.

Internacia Esperanto-Klubo Aŭtomobilista (IEKA)

La jarkunvenon sub la prezido de d-ro W. Bormann ĉeestis 46 membroj el 16 landoj. En la asocio jam membras 1140 personoj el 35 landoj. La ĉefa tasko de IEKA estas eldoni fakvortaron, kiu estas preparata.

Estis elektita nova estraro kun prezidanto Gustav Kühlmann (Danlando), vicprezidantoj John Brownee kaj Jordan Kazakov (Bg), sekretario-kasisto Jean Guillaume (F).

Aeronaŭtika seminario

Laŭ iniciato de la Aeronaŭtika Terminologio de la Scienc-Teknika Sekcio de Ĉeĥa E-Asocio okazis seminario de fakuloj pri aviado kaj aerostatado.

La ĉeestantoj priparolis problemojn ligitajn kun la ellaboro de faka aeronaŭtika vortaro en E-o kaj en pluraj aliaj lingvoj. Por la vortaro laboras larĝa internacia grupo. Gi estos eldonita de la sekcio en 1979 j. Pliaj kunlaborantoj estas bonvenaj. Kontakto Jan Pospišil, Ĉeĥa E-Asocio.

Renkontigo kun bulgaraj ĵurnalistoj

Cirkaŭ 40 E-ĵurnalistoj veturis al la Internacia Domo de Ĵurnalistoj, granda moderna konstruaĵo ekster la urbo, sur la marbordo. Gi estas uzata kiel ripozdomo de internaciaj ĵurnalistoj. Tie okazis la jarkunveno de Tutmonda Esperantista Ĵurnalista Asocio (TEJA). Post saluto de Thormodsen (Norvegio), la prezidanto de TEJA, Ivan Keremidĉiev (Bg) prezentis agadraporton. La ĉefa punkto estis la estonteco de TEJA, kiu multege malfortiĝis dum la lastaj jaroj pro la ĉesigo de ĝia revuo „Internacia Ĵurnalist“. Mankas komunikilo inter la membroj.

En la diskutado estis substrekita la neceso revigligi kaj kunligi la laboron de la membroj, precipe per reaperigo de la centra organo de TEJA. Lige kun la agado de TEJA oni aparte diskutis la rolon de la Internacia Gazetara Servo ĉe UEA.

En la nova estraro estis elektitaj s-ino A. Brennan (Britio), A. Harkovskij (USSR) kaj Donĉo Hitrov (Bg).

Komisiono pri virina agado (KVA)

Eliza Kehlet malfermis la kunvenon, kiun ĉeestis ĉ. 100 virinoj. Per mallonga priskribo de la jarraporto de la komisiono ŝi klarigis, ke ĝia ĉefa laboro dum la pasinta jaro estis ĝuste aranĝi pli ampleksan programon por tiu ĉi 63-a UK.

La virinoj elektis 5 temojn por pridiskuto:

1. E-o kiel familia lingvo kaj la nuna stato de infanlibroj en E-o.
2. La estonteco de la Komisiono.
3. Kio estas egalrajteco?
4. Ĉu ekzistas egalrajteco en la E-movado?
5. Kiel kuraĝigi la naciajn virinajn asociojn interesiĝi pri E-o?

Dum unu horo oni pridiskutis la temojn kaj poste rekunvenis por aŭdi la rezultojn.

1. **E-o kiel familia lingvo.** Necesas ligi E-on kun nur unu el la gepatroj. La alia parolu naciajn lingvon. Gravas la ofteco de la parolo kun la infano kaj necesas trovi samagulojn, kiuj povas paroli kun ĝi. Eblas en ĉiu aĝo komenci paroli kaj instrui E-on.

2. **Estonteco de KVA.** La virinoj estas ĝenerale kontentaj pri la laboro, sed necesas trovi informojn pri naciaj sekcioj. Estus utile fondi bultenon. Ankaŭ „Heroldo“ aperigu ion.

3. **Egalrajteco.** La virinoj mem devas ordigi sian propran vivon kaj ne atendi, ke iu ministerio aŭ simila faru tion. Necesas krome eduki infanojn por kompreni egalrajtecon.

4. **Egalrajteco ĉe UEA.** Tiu egalrajteco ekzistas, sed la proporcio de virinoj estas malfavora. Por helpi al tiu situacio, la virinoj mem devas esti pli aktivaj.

5. **Kiel kuraĝigi la naciajn asociojn.** Kursgvidado, prelegoj, vizito de kursoj pri retoriko. Finfine la virinoj eklaborul

Renkontiĝoj kun E. Lagadinova kaj bulgaraj virinoj

Inter la multaj aktivecoj de la Komisiono pri Virina Agado aparte elstaras la renkontiĝo kun k-dino Elena Lagadinova — prezidantino de la Komitato de Bulgaraj Vi-

E. Lagadinova parolas. Interpretas Belka Beleva.



rinoj. Dum la lunĉo por cento da invititaj kongresaninoj el ĉiuj landoj estis konigitaj la stato de la virino en la nova socialisma socio en nia lando. La konatiĝo kreskis multe pli dank'al la tri vizitoj, kiujn la kongresaninoj faris sur lokoj, kie bulgaraj virinoj laboras: tri plenaj aŭtobusoj kondukis ilin al la vestaĵfabriko „Druĵba“ (Amikeco), poste al agrikultura kooperativo kaj fine al Muzeo pri Sano. Tio samtempe estis bonega propagando de E-o antaŭ neesperantistoj.

„Vojaĝantaj sinjorinoj en la 19-a jarcento“

Tio estis la temo, je kiu Julie (Ĵulio) Tonkin — la prezidantino de la Komisiono pri Virina Agado de UEA, prelegis antaŭ centoj da aŭskultantoj. Anticipe ŝi estis skribinta sur la nigra tabulo 28 nomojn de virinoj kaj la jaron, kiam ili ekveturis por atingi sian celon, foje nur apenaŭ la sekvan jaron.

Sprite kaj elokvente Ĵ. Tonkin rakontis pri la dekoj da obstakloj, kiujn la kuraĝaj vojaĝemaj virinoj devis venki, ofte vestitaj kiel viroj, ĉar la tiaman socion forte ŝokis la fakto, ke virinoj kuraĝas vojaĝi tra la mondo.

„Por ni, la esperantistinoj, vojaĝi nun estas relative facile, — diris s-ino Tonkin. — Ni havas la Jarlibron de UEA aŭ kongreslibron kun ĉiuj instrukcioj por atingi deziratan lokon aŭ kongresejon — per kiu aŭtobuso, de kiu angulo de la strato, eĉ pri la kurzo de la valuto de la fremda lando! Sen ni havas problemojn, ni telefonas al delegito de UEA por peti helpon. Sed kia estis la situacio en la 19 jc, kiam eĉ la plej ordinara vojaĝo bezonis monatojn. . .“

Estis evidente, ke Ĵulie Tonkin pacience kolektis la materialon, konsciencie trankribis ĝin kaj prezentis al la publiko vere ĝuindan prelegon. Venontjare, dum la UK en Lucerno, ŝi legos la duan parton de sia prelego, dediĉitan al virinoj, kiuj en la 19 jc. vojaĝis al Svislando por montgrimpaj bataloj por la unua loko.

Podia diskuto

Victor Sadler prezidis podian diskuton pri „La Verkanta Virino“ inter Ada Figuera, redaktoro de „Heroldo“, Emilija Lapenna, redaktoro de E-fako de Radio Zagreb, recenzistino kaj verkistino, kaj Marjorie Boulton (Marĵori Boulton), verkistino en angla lingvo kaj en E-o.

La partoprenantoj diskutis interalie pri la problemoj, kiujn renkontas verkantaj virinoj, pri la sociaj kondiĉoj en diversaj landoj kaj ilia influo al virina kleriĝo kaj progreso en verkado kaj ĵurnalismo. En la E-movado ĝenerale oni konstatis nenium signifan antaŭjuĝon aŭ diskriminacion kon-



traŭ virina verkado, sed ekster la Movado regas fortaj antaŭjuĝoj, precipe en tiuj landoj, kie la komerca reklamado asignas al la virinoj aliajn rolojn stereotipajn. En la socialismaj landoj virinoj ne renkontas apartajn problemojn en verkado kaj okupas almenaŭ tiel gravan pozicion kiel la viroj en la literaturo kaj ekzemple en ĵurnalismo. La diskutintoj opinias, ke krom jura egaleco necesas ankaŭ edukado por ŝanĝi la restintajn antaŭjuĝojn pri verkistinoj.

Esperanta Ŝak-Ligo Internacia (EŝLI)

Sub prezido de A. Skovrind (DK) okazis kunveno de EŝLI, kies temo estis la 20-jara jubileo kaj trarigardo de la 20-jara agado. La konkludo de la kunveno estis, ke la Ligo devas fortigi kaj plibonigi sian laboron kaj fari ĝin kiel eble plej alloga kaj altnivela. Ĉeestis 42 personoj.

Dua kunveno okazis en la ĉeesto de 32 kongresanoj. Prezidis Z. Cibulka. La kunveno okupiĝis pri organizaj demandoj.

Krome: okazis 6 amikaj ŝak-matĉoj.

Maramantoj

Laŭ iniciato de P. Aitai (USSR) okazis renkontiĝo de maristoj, velsportistoj kaj maramantoj. Oni planas fondi fakan asocion.

Sporto, preparo por la Olimpikoj

El la paroladoj montriĝis, ke estas sufiĉe malfacile starigi kontaktojn kun la sportaj organizoj kaj eĉ pli malfacile estas konvinki ilin pri la neceso enkonduki la lingvon. D-ro Tonkin diris, ke li pretas esplori, ĉu la Gazetara Servo de UEA povus helpi dum la Olimpikoj.

Veterana Esperantista Klubo (VEK)

La kunvenon de la „arĝentharuloj“ prezidis d-ro Boris Nedkov. Ĉeestis pli ol 100 veteranoj, kaj de UEA — d-ro Støp-Bo-witz.

Unue d-ro Nedkov legis la saluton al la Kongreso, preparitan de la doĵeno Penko Petrov, forpasinta en januaro 1978. Per unuminuta silento oni celebris la memoron de la mortintaj intertempe veteranoj.

Raporton pri la agado kaj financa stato de VEK legis s-ino Julia Winter, la sekretario. La demando pri nova doĵeno restis decidota. Je la fino de la kunveno oni reelektis por prezidanto d-ron B. Nedkov (Bg), kaj por sekretario J. Winter (Aŭstrio).

Lige kun la konsisto de la membraro evidentiĝis, ke ĝi ne ŝanĝiĝis dum la lasta tempo, ĉar la nombro de la noveakceptitaj

membroj egalas al la nombro de la forpasintaj. E-on lernis antaŭ 60 j. 134 veteranoj, antaŭ 50 j. — 365, antaŭ 40 j. — 196 ktp. Estis faritaj longaj kaj interesaj eldiroj. La du horoj ne sufiĉis, por ke ĉiuj dezirantoj faru sian eldiron, precipe pri la temo „La unua renkontiĝo kun E-o“. V. Petkov (Bg) salutis la veteranojn per poemo. Estis levitaj demandoj pri abonado al „Veterano“, pri pago de la internacia veterana insigno (0,55 lv.), pri aĉeto de respond-kuponoj fare de loĝantoj el nepagipovaj landoj ka.

Komisiono pri internaciaj ligoj de UEA

La kunvenon prezidis d-ro H. Tonkin. Oni pridiskutis ta temojn pri UNESKO, La Monda Sanprotektita Organizaĵo, La Internacia Organizaĵo por Civila Aernavigado, la Universitato de UNO ka.

Oni daŭrigos la klopodojn pri laŭgrada enkonduko de E-o en la dokumentadon de UNO.

Okazis ankaŭ alia kunveno de la sama Komisiono kun la partopreno de Zahari Zahariev, reprezentanto de UNESKO. Li esprimis simpatian al la E-movado kaj deziron esti regule informata pri ĝia agado.

Publika kunveno pri la financoj de UEA

Sub la prezido de G. Maertens, estrarano de UEA pri financoj, kaj en kunlaboro kun d-ro H. Tonkin, la prezidanto, okazis ĝenerala kunveno je la temo „financoj“. Estis traktitaj tri ĉefaj punktoj:

1. Financoj de UEA ĝenerale
2. La Financa Programo de la E-Movado
3. Institucio „Hodler 1968“.

En la unua parto leviĝis pluraj interesaj demandoj kaj sugestoj. Ekzemple: ĉu ne indus antaŭvidi familian membrecon sen jarlibro? Kial dum kongresoj nur edzinoj havas rabatitan tarifen, kial ne ankaŭ aliaj membroj de la familio?

El la interparolo evidentiĝis, ke gravaj solvoj de la financaj problemoj estas kolektiva abonado de la revuo „Esperanto“ fare de la landaj asocioj, trafika agado, tŭrisma agado ktp. La publiko aŭdis ankaŭ, ke subvencioj estas antaŭviditaj por eldono de tutaŭfrika E-revuo.

D-ro Tonkin klarigis la celon de la Financa Programo de la E-movado. Ĝi celas ĉerpi monrimedojn el novaj fontoj kaj atribui ilin al diversaj agadoj de la tutmonda E-movado. La programo ĉerpas siajn financojn ne el kotizoj, sed el komerca agado, el donacoj kaj el fondaĵoj. Efektive ekzistas pluraj privatuloj kaj instancoj, kiuj pretas donaci grandajn sumojn, kondiĉe ke oni nur en taŭga formo faris la peton. Dum

ĉirkaŭ du jaroj oni esploras la eblecojn kaj jam havas kontentigan rezulton.

Pri la Institucio „Hodler 1968“ klarigojn donis G. Maertens. Li diris, ke la havaĵo de la Institucio konsistas el donacoj, pruntedonoj sen rentumo kaj pruntedonoj kun 2%-a rentumo. La kapitalo mem neniam estas tuŝata. La estraro de la Institucio „Hodler“ distribuas nur la rentumon inter diversaj projektoj.

Asembleo de Fakaj Asocioj

Prof. Støp-Bowitz raportis pri la pasintjara agado de la Komisiono pri Fakaj Asocioj cele al plifortigo de la kunlaborado inter la fakaj asocioj, interalie pri la ekaperigo de la bulteno „Interfake“. Li kolektis sugestojn por estonta agado kaj rilate daŭrigon de „Interfake“.

La estraro de UEA sin prezentas

Plena salono de 1200 personoj atestis la interesigon de la kongresanoj pri la laboro de UEA. La 8 estraranoj de la asocio respondis al demandoj starigitaj unuavice al la prezidanto d-ro Tonkin, kaj poste al demandoj, ĉerpitaj el la skatoloj, metitaj en la kongresejo por ebligi al kongresanoj starigi demandojn rekte al la Estraro. La demandoj estis plej diversaj.

Partoprenis aktive ĉiuj estraranoj: prof. d-ro H. Tonkin — prezidanto, mag. William Auld — pri kulturaj demandoj, prof. d-ro C. Støp-Bowitz — pri faka agado, Andrzej Pettyn — pri edukado kaj la kongresa temo en la nuna UK, Ursula Grattapaglia — pri landa agado, Flora Szabo-Felső — pri kongresoj kaj turismo, Gregoire Maertens — pri financoj, kaj d-ro Werner Bormann — pri administraj kaj ĝeneralaj demandoj.

Krom kelkaj demandoj (pri pli vasta eldonado de libroj tra normalaj libromerkatoj, starigo de mezgrada internacia ekzameno kaj de kursoj pri administraj gvidantoj) la plimulto de la demandoj koncernis kongresojn kaj aparte la nunan UK. Oni anoncis la intencon pli frue fiksi kaj pretigi la kongresan temon.

Fermante la kunsidon, la prezidanto de UEA dankis la partoprenintojn kaj direktis apartan dankon al la demandintoj, komentante, ke sugestoj kaj proponoj pri la agado de UEA estas bonvenaj dum la tuta jaro.

TEJO sin prezentas

Ankaŭ dum tiu ĉi UK kelkaj programeroj estis speciale dediĉitaj al la junularo.

En la granda salono de la kongresejo okazis Junulara Balo, en kiu partoprenis kelkiloj da homoj. La etoso estis tre bona. Krom la dancmuziko estis aŭdigataj regule

ĉarmaj kanzonoj en la Internacia Lingvo.

Jaŭdatene komenciĝis en ĉeesto de 120 personoj la programero „TEJO sin prezentas“ sub la gvido de d-ro Savas Tsiturides (Gr), prezidanto de TEJO.

Parolis unue Bruĉjo Kasini (I), la ĝenerala sekretario de TEJO, kiu klarigis la pozicion de sia organizo al UEA. Sekvis paroloj de la du vicprezidantoj: MacGill (NZ), kiu ĉefe parolis pri la revuo „Kontakt“, kaj Csaba Lendvay (H), kiu okupas sin pri la eksteraj rilatoj de la organizo. El la ĉeestantaj estraranoj laste parolis F. Gabalda (F), kiu respondecas pri regiona agado.

S. Tsiturides klarigis la rolon de la TEJO-komitato kaj la laboron de la konstantaj komisionoj.

Estis duonhora por demandoj de la publiko, en kiu evidentiĝis la ebleco starigi rilatojn kun aktivaj junuloj el Rumanio.

TEJO-debato

Formon tute novan por la UK enkondukis TEJO per sia debato pri la frazo „La evoluigo de la E-kulturo estas la ĉefa faktoro en la evoluigo de E-o“. Disputis du teamoj. La pozitiva teamo akcentis, ke la kulturo estas la bazo, de kiu dependas ĉiuj disvastigaj provoj por la lingvo. Kontraŭe, la negativa teamo postulis, ke sistema organizado kaj informado plej gravas por la plua disvastigo de E-o.

Aparte imponis la trafaj postdebataj intervenoj de la publiko. Novaj kaj nenovaj vidpunktoj esprimiĝis en valora kaj sprita diskuto. Evidentis, ke la temo tuŝis la interesigon de la aŭdantaro.

LLK de Svislando

La Loka Kongresa Komitato de la venonta UK en Lucerno prezentis al la kongresanoj tri filmojn pri sia hejmlando. La unua temis pri Lucerno mem, la dua montris impresojn pri la monto Pilatus, al kiu duontaga ekskurso celos dum la kongresa semajno, kaj la tria donis ideon pri la suda parto de Svislando.

Ekumena diservo

En la ortodoksa katedralo de Varno okazis ekumena diservo, organizita de IKUE kaj KELI kunlabore kun la Bulgara Ortodoksa Eklezio.

Ĉeestis kelkdeko da sacerdotoj de la tri menciitaj kristanaj konfesioj: romkatolika, protestanta kaj ortodoksa.

En la nomo de la Bulgara Ortodoksa Eklezio la partoprenantojn salutis metropolito Josif de Varno.



Ĉeestis la kunvenon ĉ. 230 personoj. Prezidis Baldur Ragnarsson (Islando). Post enkondukaj vortoj lige kun la E-literaturo, kun la konkursaĵoj (178 verkoj), ties mankoj kaj ecoj, B. Ragnarsson anoncis la novan konsiston de la komisionoj pri ĉiuj branĉoj kaj la nomojn de la premiitoj. Jen ili:

Prozo

1. Spomenka Štítec (Jugoslavio) „Nepagipova lando“
2. Eva Tófalvi (Hungario) „Historio de nia amikeco“.
3. Egale al: Ludoviko Izák (Ĉeĥoslovakio) „Somera Interludo“ kaj Rajna Konstantinova (Bulgario) „La eta ruĝa albumo“.

Poezio

1. Kris Long (Anglio) „Poemoj sen titolo“.
 2. Reĵna de Jong (Nederlando) „La merlo“.
 3. Maŭro Nervi (Italio) „La turoj de l'ĉefurbo“.
- Laŭda mencio: Aldo de Giorgi (Italio) „Ĝis“.

Teatraĵoj

1. Maŭro Nervi (Italio) „Klitemnestra“.
2. Vesna Skaljer-Race (Jugoslavio) „En juĝejo“.
3. Bernard Golden (Hungario) „Saluto al Paradizo“.

Eseo

Premio „Luigi Minnaja“: Karolo Piĉ (Ĉeĥoslovakio) — „Lingvistikaj problemoj de la originala romano Esperanta“.

Nova Talento

Premio Harabaĝiu: Barbara Sokalówna (Pollando) „Doktorino Emilia“.

Fotografio

1. Leila Kantonen (Finlando) „Sen Vortoj“.
2. Zdravko Nikolov (Bulgario) „Generacioj“.
3. Leszek Wolski (Pollando) „Ne plu militon!“.

Laŭdaj mencioj:

Jarmila Rybáková (Ĉeĥoslovakio) „Ĝojo“.
Zdravko Nikolov (Bulgario) „Je alies kosto“.

Leszek Wolski (Pollando) „Ekinteresiĝo“.

Foiro por kolektantoj

Kolektiĝis proksimume 70 interesitaj kongresanoj, kiuj utiligis la okazon por interŝanĝo de insignoj, poŝtmarkoj, poŝtstampoj kaj aliaj objektoj. En la mallongaj paroloj de kelkaj plej aktivaj kolektantoj estis interŝanĝitaj opinioj kaj proponoj, kun ĝojo salutitaj la regula aperado de „Kolektanto“ en Bulgario, la apero de E-poŝtmarko okaze de la 63-a UK ka. La ĉeĥa e-isto Hasala informis pri gravaj sukcesoj sur tiu kampo en Ĉeĥoslovakio.

OFICIALA AKCEPTO DE LA ALTA PROTEKTANTO PETRO TANĈEV

La 1-an de aŭgusto en la salonegoj de la reprezenta hotelo „Ĉerno More“ la unua vicprezidanto de la Ŝtata Soveto de PR Bulgario kaj prezidanto de la Honora Komitato de la 63-a UK de E-o Petro Tanĉev oficiale akceptis kongresanojn kaj donis por ili koktelon. La koktelon partoprenis 500 gvidantaj e-istoj el pli ol 50 landoj de la mondo.

INTERNACIA SOMERA UNIVERSITATO (ISU)

La Internacia Somera Universitato estis inaŭgurita en la ĉeesto de pli ol 100 kongresanoj. En sia malferma parolado prof. Vasil Peevski (Bg), rektoro de ISU, substrekis la ĉiam pli kreskantan bezonon pri internacia lingva rimedo en la nuntempa vivo. Aparte li emfazis tiun bezonon por la sciencistoj en ties personaj ligoj, por la ligoj inter sciencistaj asocioj, por la laboro de iliaj kongresoj, konferencoj ks. Esperanto povas plene kontentigi tiun bezonon.

En ISU okazis 10 prelegoj. Ĉi-sube ni donas koncizajn notojn pli ili en alfabeto ordo de iliaj aŭtoroj.

Aur el Boja: «LA BAZA VORTPROVIZO KAJ LA VORTSTATISTIKAJ STUDOJ EN E-O»

Doc. Aurel Boia (Rumanio), doktoro pri filozofio (sociologio), parolis antaŭ pli ol 100 kongresanoj. Li substrekis, ke en la instruado de lingvoj, inkluzive de E-o, gravan rolon havas ne nur la sinsekvo de la instruataj gramatikaĵoj, la metodo uzata pri ilia prezentado kaj la ekzemplaj frazoj aŭ tekstoj, sed ankaŭ la vortprovizo de la lernolibro aŭ kurso.

Estas sciate, ke ne ĉiuj vortoj havas saman gravecon. Tio dependas unufoje de ilia ofteco. Estas do necese, ke ĝuste tiuj

vortoj, kiuj, laŭ la trafa esprimo de K. Kalocsay, formas la trunkon de la lingvo, estu sufiĉe priatentataj de la aŭtoroj de lernolibroj kaj de la kursgvidantoj. Surbaze de baza vortprovizo oni povas kompili pli taŭgajn lernolibrojn kaj elementajn kaj mezampleksajn vortarojn. La starigo de baza vortprovizo kaj la vortstatistikoj gravas ankaŭ por la scienteoriaj studoj.

La baza vortprovizo de E-o prezentigas sub du formoj: minimuma (elementa) vortaro de 600—700 vortoj, kaj baza vor-

tarro de 2400—2500 vortoj (inkluzive de la minimuma vortaro). Pro la ega graveco de la minimuma vortaro, kun kiu la lernantoj kontaktiĝas unue, ĝi ricevas en E-o pli da atento.

Doc. Boia priskribis koncize ankaŭ la

Jonathan Pool: «MODELOJ POR SOLVI LA LINGVAN PROBLEMON»

Tiel titoliĝis la prelego de Jonathan Pool (Usono), doktoro pri politik-scienco, prezentita antaŭ 70-homa aŭskultantaro. D-ro Pool prezentis tri modelojn por solvo de la

historion kaj la nunan staton de la ĉi-faka studoj. Kritikante kelkajn pli fruajn provoj'n li esprimis la esperon, ke post nelonga tempo aperos adekvataj minimuma kaj baza vortaroj de E-o.

lingva problemo. Temas pri „unuopula de cidmodelo“, „ludmodelo“ kaj „sociboneca modelo“.

Sergej Krajnov: «LA HIPOFEO — KURACA, NUTRA KAJ GRUNDONPLI-BONIGA PLANTO DE AŬRAZIO»

Sergej Krajnov, veterano de la Soveta E-movado, estis instruanto en la Agrikultura Akademio „Timirjazev“, iniciatinto de Nalĉika Hortikultura Eksperimenta Stacio kaj estro de fako de agrotekniko kiel scienca esploristo. Li prelegis pri la tre valora eŭrazia planto hipofeo (*Hippophaia rhamnoides* L.). Inter la demandoj, tuŝitaj de li, estis: la ekologio de la hipofeo; ties rezisteco kontraŭ frosto, sekeco, inundo, venta kaj akva erozioj; naturaj kaj agroteknikaj kondiĉoj,

plej favoraj por grandaj rikoltoj de hipofeo; kemia-fiziologia konsisto de la fruktoj de hipofeo kaj de la oleo el ili; kuraca uzo de la hipofeo en la „popola medicino“ kaj la tiucela scienca uzo de la hipofeo en Sovetunio; nutra kaj profilaktika signifoj de hipofeo; stato kaj perspektivoj de hipofeo — kulturado en diversaj landoj de Eŭropo kaj Azio ktp.

La prelego vekis grandan interesigon.

[Laszlo Götler Karpati: «KOMPUTILAJ RETOJ KAJ LA LINGVOPROBLEMO»

Per sia prelego Laszlo Karpati, hungaro, elektroingeniero, konsilanto pri konstruo de komputila reto, konigis la esencon de komputilaj retoj kiel rimedo por venigi prilaboritajn kaj ordigitajn informojn al

individoj kaj kompanioj. Li ankaŭ resumis la lingvajn problemojn, kiuj ekzistas kaj kreskas en la grandaj eŭropaj internaciaj komputilaj retoj.

Margrete Landmark: «PRI UNU TIPO DE MALFACILAĴOJ EN LA LERNADO DE SKRIBADO»

Magistrino pri psikologio, fiziologio kaj pedagogio kaj universitata lektoro pri psikologio, s-rino M. Landmark tre kompetente traktis sian temon.

Kiel sciante, la ortografio de E-o estas tre simpla kaj facila. Nur ĉe la desegnado de la literoj iuj renkontas malfacilaĵojn. Infanoj, kiuj lernas la skribarton,

ordinare multe laboras por desegni belajn literojn. Por kelkaj infanoj la desegnado de la literoj estas tiel malfacila, ke ili tro malrapide progresas en la lingvolernado. Tio malhelpas la lernadon ankaŭ en aliaj fakoj.

La prelego de M. Landmark traktis ĝuste tiun problemon. Ĝi estis ilustrita per lumbildoj.

Saburô Jamazoe: «KIO ESTAS PROSTAGLANDINOJ?»

Prof. Jamazoe, japano, doktoro de medicino, konigis al siaj aŭskultantoj la esencon de la prostaglandinoj kaj ties signifon por la homa organismo. Prostaglandinoj (PG-oj) estas grupo de la substancoj, kiuj produktiĝas el iuj grasacidoj en la homa

korpo. Ili havas saman strukturon, sed treege diversajn gravajn funkciojn. Oni utiligas ilin en la medicino en kazoj de artefarita aborto kaj akcelo de akuŝo, ankaŭ ĉe astmo, hipertensio, ulceroj ktp.

Vilmos Benczik: «TEORIAJ PROBLEMOJ DE LA ESPERANTA LITERATURO»

V. Benczik, adjunkto ĉe la katedro pri lingvoj kaj literaturo en la Budapeŝta Pedagogia Altlernejo kaj ĉefredaktoro de „Hungara Vivo“, parolis antaŭ plena aŭditorio pri tiu tre grava kaj aktuala temo. Li substrekis, ke kvankam la E-literaturo lastatempe ĉiam pli ofte fariĝas objekto de seriozaj studoj, tamen ĉiuj similaj studoj anstataŭas ĝin kiel specialan kulturen atin-

gaĵon de la E-movado. Malofte aperas atute mankas studoj, kiuj aplikas la kriteeriojn de la ĝenerala literaturscienco. Ĉio ĉi ne tute senkaŭze elvokas skeptikecon ĉe iuj literatursciencistoj, kiam ni parolas pri la sukcesoj de la E-literaturo. Do jam estas tempo pli serioze, science okupiĝi pri la problemoj de tiu literaturo.



Vasil Ĉoĉov: «UTILIGADO DE LIBERA TEMPO»

En sia prelego Vasil Ĉoĉov, profesoro pri filozofio kaj sociologio en la Supera Kemi-Teknologia Instituto en Sofio, traktis la sociologiajn kaj psikologiajn aspektojn de la supre menciita temo. Li substrekiis, ke la utiligado de la libera tempo dependas de multnombraj faktoroj, objektivaj kaj su-

bjektivaj, kaj parolis precipe pri la rolo de la persono en la utiligado de la libera tempo. Tiu utiligado ne ĉiam estas racia, eĉ kiam por ĝi ekzistas favoraj kondiĉoj. Tio dependas de la organiza kapablo kaj de la celkonscia agado de la persono mem.

Sin'itirō Kawamura: «PLANTAJ FIBROJ KIEL KOMPONAĴOJ DE MANĜAĴOJ»

La preleganto, prof. Kawamura (Japanio), prezidanto de ISAE, atentigis pri la fakto, ke en evoluantaj landoj la manĝaĵoj enhavas pli malmulte da plantaj fibroj ol en evoluantaj landoj. Lige kun tio

iaj medicinistoj asertas, ke la manko de plantaj fibroj estas la kaŭzo de la t. n. civilizaciaj malsanoj: diabeto, arteriosklerozo, kancero de la dika intesto ka.

Wim M. A. de Smet. «LA BALENOJ, MINACATAJ GIGANTOJ DE LA OCEANOJ»

Antaŭ pli ol 200 kongresanoj Wim M. A. de Smet (Belgio), d-ro pri zoologio, faris sian prelegon je la supra temo, enkondukante ĝin per trafe elektitaj diapozitivaj. Li memorigis, ke pro la granda kvanto da karno, graso kaj aliaj materialoj en la korpo de la balenoj, tiuj plej grandaj bestoj de la mondo

estas avide ĉasataj jam de jarcentoj, pro kio ilia nombro konstante malkreskas. Internacia Komisiono provis reguligi tiun ĉasadon, sed sen granda sukceso. Pro multaj kaj diversflankaj agadoj de protektaj organizaĵoj kaj pro la insistado de internaciaj instancoj nova regularo pri balenĉasado nun ellaboriĝas,

ESPERANTOLOGIA KONFERENCO

Sub komuna aŭspicio de la Internacia Somera Universitato kaj la Centro de Esploro kaj Dokumentado pri la Monda Lingvo-Problemo unuafoje en la historio de UK en Varno okazis Internacia Konferenco pri Esperantologio. Ĝia celo estis resumi per prelegoj kaj diskutoj sur alta nivelo la nunan esplorstaton de la esperantologio kaj montri la direktojn de estonta agado. La Konferenco estis forumo por jam agantaj esperantologoj kaj samtempe stimulis por aliaj kapabluloj komenci sciencajn studojn de E-o.

La Konferenco esis tre sukcesa manilestiĝo. Ĝi konsistis el tri duhoraj kunvenoj. Gvi. dis ilin d-ro Detlev Blanke (GDR), estrarano de CED. Ĉiuj prelegoj estis amase vizititaj post ĉiu okazis vigla diskutado.

Unua kunveno

En la ĉeesto de pli ol 150 personoj malfermis la Esperantologian Konferencon d-ro Detlev Blanke. Li ankaŭ prelegis je temo: „Kelkaj problemoj de internacie kunordigita esperantologia esplorado“.

D-ro Blanke substrekiis, ke en ekstermovadaj sciencaj rondoj kreskas la konscio pri la ekzisto de internaciaj lingvaj problemoj kaj preteco pli serioze okupiĝi pri E-o. Samtempe malpli evoluas la sinadaptado de

esperantologoj al tiu tendenco. Tiu postresto devas esti forigita.

La dua preleganto, prof. Kawasaki (J), parolis je la temo „Lingvistika terminaro de E-o“. Li tuŝis kelkajn problemojn rilatajn al la verkado de E-vortaroj.

La temo, pri kiu prelegis prof. O. Reiersol (Norvegio), estis: „Problemoj de la vortfarado en E-o“. Li parolis precipe pri la kriterioj por kreo de matematikaj terminoj, donante multajn ekzemplojn.

Dua kunveno

Ceestis 120 personoj. Post enkondukaj vortoj de d-ro Detlev Blanke la parolon havis Karolo Piĉ el Ĉeĥoslovakio, kiu parolis pri „Evoluo de Esperanto“. En sia prelego li pretendis, ke E-o ne estas aglutina, sed komputila lingvo, kaj ke ĝi ne evoluas kiel la aliaj lingvoj, sed nur alprenas novajn elementojn, kiujn ĝi lokas en sia neŝanĝebla baza strukturo. El tio li konkludis, ke la plua evoluo de E-o

devas esti metoda. Ĝi devas sekvi la kibernetikan strukturon de la lingvo kaj ne la hazardajn modifojn, kiuj rezultas el la ĉiutaga konversaciado.

„Libereco kaj aŭtoritato en la evoluo de E-o“ estis la ĝenerala temo, el kiu Fr. Lo Jacomo el Francio elektis la subtemon „Lingvistika balasto kaj evoluo“. Li per ekzemploj montris, ke klara aŭdebleco de iuj vortopartoj ne nepras por kompreniĝo,



dum aliaj estas pli esencaj. Li indikis, ke la graveco de tiuj elementoj al kompreniĝo povas variu en la paso de la tempo.

La tria preleganto estis **Boris Kolker** el Sovetunio, kiu parolis pri la temo „Interlingvistika agado en Sovetunio“. Kolker proponis difinojn de la interlingvistiko kaj informis pri kursoj kaj ekzamenaj deman-

doj pri interlingvistiko en la soveta universitata sistemo. Prelegfine li pledis por la pretigo de baza universitatnivela teksto pri interlingvistiko.

La tempo ne sufiĉis por kontentigi la intervenemon de la aŭskultantoj, kiuj nombris ĉirkaŭ 150. La plej forta debatado koncernis la tezojn de Karolo Piĉ.

Tria kunveno]

Pro f. d-ro Stojan Juĝev (Bg), akademiano, malfermis la programon per sia prelego „Estetikaj problemoj de la Lingvo Internacia“. Li starigis la tezon, ke la intonacio, ritmo kaj „muziko“ de la lingvo formas ĝian estetikajn bazon, precipe en poezia, teatra aŭ oratora kunteksto. Li akcentis, ke samkiel en la muziko, aparte gravas la rolo de disonancoj, el kiuj la lingvo ĉerpas sian dinamikecon kaj vivantecon.

Sekvis la prelego de **mag. Arni Bodvarsson** el Islando kun la titolo „Rilato inter lingvo, penso kaj nocioj el Esperanta kaj okcidenteŭropa vidpunktoj“. La preleganto proponis kategoriojn por la nocioj ago, proceso, eco, loko, tempo kaj objekto. Li starigis la demandon, ĉu la e-istoj ne estas

tro rigore influataj de la nocioj kaj frazstrukturoj de siaj naciaj lingvoj. A. Bodvarsson per pluraj ekzemploj ankaŭ atentigis pri nocioj teorie fareblaj en E-o, kiuj tamen ne havas komune akceptitajn signifojn.

Kompletigis la tritagan konferencon la naŭa prelego, kiun prezentis **d-ro Verloren van Themaat** el Nederlando: La internacia vortaro kaj ĝia signifo por la dezirinda formo de planlingvo. Li ekzamenis la vortaron de E-o kaj Interlingua laŭ la kriterioj de natureco, komprenebleco kaj reguleco.

Kiel en la antaŭaj sesioj de la Konferenco, la salono estis homplena (ĉ. 130 ĉeestantoj), kaj postaj intervenoj abundis.

LINGVAJ KURSOJ

● Konversaciajn rondojn por nespertaj e-istoj gvidis teamo sub direktado de Francisko Simone (Francio).

● Progresigan kurson de E-o gvidis Jürgen Hamman (GDR).

● Elementa E-kurso laŭ Ĉe-metodo estis

gvidita de Eva Farkaš-Tatar (Hungario).

● Seminario pri Ĉe-metodo okazis sub la gvido de doc. Georgi Dimov (Bulgario).

● Tuj-kurso de bulgara lingvo okazis sub la gvido de Kunčo Vălev (Bulgario).

KUNSIDOJ DE LA KOMITATO DE UEA

Dum la kongresa semajno la Komitato de UEA kunsidis 7-foje. Ĉeestis 51 komitatanoj, 12 anstataŭantoj kaj 3 observantoj. Tre grava: la Komitato akceptis la aliĝon al UEA de 5 novaj landaj organizaĵoj: Brazilo, Malto, Meksikio, Peruo kaj Venezuelo. Per tio la aliĝintaj landaj organizaĵoj de UEA atingis rekordan nombron: 40!

Unuanime estis elektita kiel honora membro de UEA s-ano Ŝihej Mijake (J), kiu dum 40 jaroj estis la animo de la E-movado en Japanio.

La Komitato akceptis la novan statuton de TEJO. La definitiva akcepto de la statuto de UEA — multe pli komplika — restis por la 64-a UK en Lucerno. Gis tiam funde

trastudos kaj preparos ĉion speciala komisiono.

La Komitato aprobis la raporton de la Estraro. Aparte voĉdonitaj kaj akceptitaj estis la financaj partoj de la raporto.

Ĝi okupiĝis ankaŭ pri multaj aliaj demandoj kiel: la 30-a datreveno de la Universala Deklaracio pri Homaj Rajtoj, reelektado de la estraro de CED, modifoj de la Kongresa Regularo kaj Regularo pri la Honora Patrona Regularo, eksteraj rilatoj de UEA, faka kaj landa agado, elektoj en 1980, edukado, informado, virina agado, kongresoj, ISU ka. Entute dum la 7 komitatkunsidoj estis traktitaj ĉ. 40 demandoj. Tio elokvente parolas, ke en Varno la Komitato laboregis.

TEATRAĴOJ

Jam delonge **Bulgara Esperanto-Teatro (BET)** estas konata al la esperantista publiko pro siaj teatro-prezentoj dum UK kaj aliloke. Ĝojiga fakto estis, ke ĝuste nun, okaze de la 20-jara datreveno de la fondiĝo

de BET, ĝi povis havi sian „nask ĝfeston“ en propra lando. Por tion fari, BET elektis ĉi-jare teatraĵon de Anton Strašimirov (1872—1937) — bulgara aŭtoro, kaj eĉ pli: aŭtoro, kiu naskiĝis en Varno. A. Straši-



mirov estas konata pro siaj dramoj kaj romanoj, inter kiuj kelkaj tradukitaj en plurajn lingvojn.

La teatraĵo, elektita de BET, nomiĝas „La Megero“ (la originala titolo „Bopatrino“). La temo de tiu ĉi komedio estas prenita el la bulgara vivo en la fino de la pasinta jarcento.

La prezento estis impresanta, kaj la miloj da ĉeestantoj certe gardos bonan memoron pri ĝi.

Fine de la vespero la gvidanto de BET Kiril Draĵev estis dekorita per la ordeno „Kiril i Metodi“ — II grado, per kiu la Ŝtata Soveto de PR Bulgario honoris lin pro lia laboro.

En siaj dankparoloj d-ro Tonkin substrekiis la valoron de BET por disvastigo de la kulturo.

BULGARA VESPERO

Post malfermaj vortoj la noro „Rodna pesen“ el urbo Târgoviște (Bg) bonvenigis la kongresanaron per la kanto „Kie estas Bulgario“.

Aprezataj estis la du operkantoj, kiujn prezentis Milka Sapunĝieva: „Napola kanto“ de Petro Iliĉ Ĉajkovskij kaj „Pristanuška“ de Georgi Zlatev Ĉerkin. Kompletigis tiun eron prezento de la tuta ĥoro de la fina ĥora kanto el la opero „La sorĉa fluto“ de V. A. Mocart.

La dua ero estis la amuza kamparana dialogo „Dio absolvu“ de Elin Felin, prezentita impreso de la artista geedza paro Belka Beleva kaj Anani Anev.

Sekvis la prezento de Rajna Stojanova el la operteatro de Varno, kiu kantis la arion de Adriana Ljokuvrjor el la samnoma opero de Ĉile kaj la arion de Toska el la opero „Toska“ de Puĉini. La pianakompanantino estis Katja Ĥristomanova.

INTERNACIA ARTA VESPERO

Tiu ĉi tradicia ero de UK prezentis tre riĉan programon. Krom la vaste konataj al la monda E-publiko bulgaraj gekantistoj Maria Angelova kaj Veselin Damjanov ĝin partoprenis ankaŭ la merita aktorino Ljudmila Ĉeŝmeĝieva kaj Ljubomir Avramov el Sofio kaj Amalia Marinova el la operteatro de Varno, Rosica Janĉeva el Sofio kaj Radka Malamova el Plovdiv. Denove

El la opereta teatro de urbo Jambol Galja Kostova belege kantis la arion de Adela el la opereto „La Vesperto“ de Ŝtraus. Ŝi prezentis ankaŭ la arion de Silva el la opereto „La Reĝino de Ĉardaŝo“ de Imre Kalman.

Pri ambaŭ kantistinoj la publiko entuziasmis. Ĝi tamen rezervis sian plej tondran aplaŭdon por la lasta ero — la vigla kaj bunta prezento de la ŝtata ensemblo de Varnopor popularaj kantoj kaj naciaj dancoj. Alternis orkestraj prezentoj, solo-kantoj kaj dancoj — ĉio prezentita kun admirinda precizeco, neniam ŝanceliĝanta eĉ dum ritme plej viglaj partoj de la dancspektakloj, kiujn foje prezentis la tuta ensemblo de ĉirkaŭ 50 dancistoj. Kontrastis impone la voĉa ĥoro, kiu kantante sen orkestra akompano absolute silentigis la aŭdantaron de ĉirkaŭ 3600 personoj.

prezentis sin al la publiko Margaret Collins (Britio) kaj Miroslav Smička (ĈSSR). Partoprenis ankaŭ Gianfranco Molle (I.), pola kaj hungara kantistinoj Božena Zbozrovska kaj Ilona Duga. Poeziaĵojn de Kolocaj recitis la pola aktorino Jadviga Gibĉinska.

La tutan programon gvidis s-ino Emilia Lapenna.

KONCERTO DE VESELIN DAMJANOV

Neforgeseblan ĝuon donis al la kongresanoj la memstara koncerto de la vaste konata baritono-esperantisto Veselin Damjanov (Bulgario). Dum pli ol unu ĥoro li plenumis en E-o ariojn el operoj kaj operetoj, popularajn bulgarajn kaj rusajn kantojn kaj proprajn komponaĵojn. Per sia altnivela arto Damjanov kaptis la kelkmilan publikon, plenigintan la plej grandan salonon de la kongresejo. Oni tondre lin aplaudis kaj postulis ripetojn. Aparte majstre estis plenumitaj „La pulo“ de la rusa kom-

ponisto Modest Musorgskij kaj la propraj komponaĵoj „Mia kolekto“ laŭ teksto de Asen Grigorov (Bg) kaj „Verdaj krokodiloj“ laŭ teksto de Romano Grinŝpan (USSR). Ĉe la piano ĉiam estis Evĝeni Komarov.

V. Damjanov, jam laŭreato de internacia festivalo en Francio (Clermont-Ferrand, majo 1978), kie li gajnis la unuan premion, per siaj manifestiĝoj dum la 63-a UK en Varno kaj dum la 34-a IJK de TEJO en Veliko Târnovo firmiĝis sendube kiel la plej elstara nuntempa kantisto-esperantisto.



Merkredon, la 3-an de aŭgusto, okazis pluraj ekskursoj de Varno al diversaj lokoj en kaj ekster Bulgario.

Ekskurso B₁ celis ĉefe la banlokojn Albena, Balĉik kaj Kaliakra. Albena belas pro siaj individue kreitaj domarkitekturaĵoj, Balĉik — pro sia unike bela ĝardeno kaj Kaliakra — pro siaj rokoj. La ekskurso estis vere travivinda!

La dua grupo (B₂) vizitis la urbon Nesebâr kaj la faman plaĝon Suna Bordo. Nesebâr vekis aparte grandan intereson. Estis vizititaj ĉiuj antikvaj preĝejoj kaj aliaj historiaĵoj.

Ekskurso B₃ kondukis la kongresanojn al Pliska, Madara kaj Sumen. Unue ili vizitis la famajn „Pobiti Kamâni“ (la t. n. „Stona Arbaro“) — kolonformaj rokoj, kiuj nature staras, formitaj dum la paleogeno

en la tiama maro. Poste la veturo iris al Pliska — la unua bulgara ĉefurbo, kie videblas la elfosaĵoj de la iama bulgara reĝa palaco. En Madara la kongresanoj vidis la interesan bareliefon „Rajdanto de Madara“, ĉizitan sur la rokoj en alteco de 40 metroj. En Sumen oni vizitis unu el la plej malnovaj grandaj moskeoj de la Balkana Duoninsulo.

La kvara ekskurso estis internacia — ĝis urbo Mamaĵo en Rumanio, la plej fama rumana ripozloko.

Ankaŭ TEJO organizis ekskurson. Ĝin partoprenis nur gejunuloj ĉeestintoj de la 34a IJK en Veliko Târnovo. Oni vizitis la ripozejon de Albena kaj la palacon kaj belegan botanikan ĝardenon de Balĉik.

Mallongedaŭraj ekskursoj tra Varno kaj vizitindaj lokoj en ĝia ĉirkaŭaĵo okazis plurfoje.

EKS POZICIOJ

Filatelo

Dum la kongrestagoj en la vestiblo de la kongresejo estis aranĝita filatela ekspozicio. En la nomo de la Asocio de Bulgaraj Filatelistoj ĝin malfermis Dimitro Kraev.

— Parto de la nuna ekspozicio, — diris li, — estas dediĉita al la E-movado en Bulgario kaj al la Bulgara Filatelista Movado, kiuj havas longan historion kaj bonan kunlaboron. Certe la e-istoj renkontiĝos denove en majo de la sekva jaro en la Monda Filatela Ekspozicio „Filaserdika-79“, kiun dommastros Sofio.

La prezidanto de UEA d-ro Tonkin substrekiis la bonajn ligojn inter e-istoj kaj filatelistoj.

— Ne estus troigite, — diris li, — se mi mencias, ke preskaŭ ĉiu e-isto estas ankaŭ filatelisto. Mi ĝojas, ke en Bulgario la filatelo havas tiel altan nivelon: ĉiujare ĉe diversaj okazoj oni eldonas interesajn poŝtmarkojn. Ankaŭ nun, honore al la 63-a UK, estas eldonita poŝtmarko.

Grandan variecon kaj originalan elformigon montris la tabuloj kun poŝtmarkoj de Ljubomir Leviĉarov el Sofio: pri antaŭuloj de E-o, kun portretoj de eminentuloj, eldirintaj favorajn opiniojn pri E-o; poŝtmarkoj, kaj aliaj filatelaj materialoj lige kun E-kongresoj.

Riĉaj laŭ enhavo estis ankaŭ la tabuloj de Valeri Jotov el Varno (la ŝipoj dum la jarcentoj), Lazar Lazarov el Pleven (la mirinda mondo de la silento), Canko Bojaĝiev el Varno (nia patrolanda nigramara regiono), Ljudmil Petrov el Drjanovo (fiŝkaptistaj, pasaĝeraj, komercaj kaj velaj ŝipoj), Andrej Videnov, inĝ. Nikolaj Rajĉev ka.

Kopernik

La Etnografia Muzeo de u. Torun (Pollando) kune kun Pola E-Asocio organizis speciale por la 63-a UK ekspozicion je la temo „Nikolaj Kopernik en la pola popola arto“.

La ekspozicio prezentis lignoskulptaĵojn pri Kopernik — unu el la plej grandaj sciencistoj-astronomoj de la homaro. Notinda estas la fakto, ke la Muzeo en Torun uzas ankaŭ E-on por popularigi siajn kolektojn. Krom la esperantlingvaj surskriboj sur la ekspoziciaĵoj estis ankaŭ esperantlingva katalogo, speciale eldonita por UK en Varno. Ĝi estis disponata al la vizitantoj senpage.

Pentraĵoj

S-anino Katja Maneva, pentristino el Sofio, montris impresajn verkojn de sia peniko. La materialon por ili ŝi kolektis abunde dum siaj vojaĝoj al diversaj landoj kiel e-istino, precipe por partopreni UK de E-o.

Naciaj kostumoj

Malfacile oni povus ĉirkaŭrigardi la ekskluzive grandan variecon kaj riĉecon en la naciaj vestaĵoj de bulgaroj el diversaj anguloj de la lando. Parton de tiu varieco treege sukcese prezentis Jordan Spasov el Jambol. Liaj majstre faritaj figuretoj vekis grandan intereson inter la eksterlandaj gastoj.



Brodaĵoj

Ĝi montris brodaĵojn ellaboritajn kun granda lerteco kaj subtila estetika gusto de nia aktivulino el Varno Penka Apostolova — prezidantino de E-societo en la Sipripara Uzino.

DIVERSAJ ARANĜOJ

Krom la menciitaj ĝis nun aranĝoj, dum la kongresaj tagoj okazis ankaŭ: Interkona Vespero, Kongresa Balo, Junulara Vespero, kvizo (demandokonkurso) „Por ke vi sci...“ (sub la reĝisorado de la konata itala literatoro Aldo de Giorgi), koncerto de ĥoro

La 1300-jariĝo

La ekspozicio — bildoj kaj fotoj — estis dediĉita al la glora evento en la historio de Bulgario — la 1300-a datreveno de la fondiĝo de la bulgara ŝtato, kiun la bulgara popolo solene celebros en 1981 j.

„Rodna Pesen“ de u. Târgoviște kaj la ĥoro ĉe la Asocio de la Blinduloj en Bulgario, Distra Foiro, Turisma Foiro, Bankedo ka.

Dum la du Vesperoj kaj la Balo plezurigis la publikon per sia bela muziko la pola ensemble „Anda“.

FERMO DE LA 63-A UK

Lasta kunveno. La vastega centra halo „Hodler“ denove plenplena. Ĉeestas ĉiuj kongresanoj. Prof. d-ro Tonkin malfermas la kunvenon.

D-ro Bormann koncize resumas la kongresan laboron.

A. Pettyn prezentas la kongresan rezolucion. Oni unuanime akceptas ĝin.

B. Ragnarsson anoncas la rezultojn de la Belartaj Konkursoj.

Aldo de Giorgi sciigas la rezultojn de la kvizo.

Kaj jen — la prezidanto H. Tonkin ekstaras antaŭ la mikrofono. Lastaj vortoj. La fermaj... Li parolas pri la kongresoj de la Universala E-Asocio dum la lastaj jaroj, substrekante, ke la Kongreso en Varno estis vere universala, la plej universala ĝis nun — ĝin partoprenis homoj el 51 landoj de la kvin kontinentoj. Kaj la prezidanto trovas la plej trafan difinon de tiu ĉi kongreso — „giganta“! Giganta, ĉar en ĝi estis pli ol 4500 e-istoj el ĉiuj rasoj de la tero. Kaj ankaŭ inspira. Inspira al sindona, entuziasma laboro. Sendube, ĝi donos fortan puŝon al la tutmonda E-movado antaŭen al novaj, pli grandaj sukcesoj kaj por nia lingvo E-o, kaj por la granda afero de la amikeco kaj kunlaboro inter la popoloj, por la paco sur nia planedo.

Honore al la 63-a UK de E-o la Ministerio de Komunikoj eldonis specialan poŝtmarkon je valoro de 13 stotinkoj. Sur ĝi la pentristo Todor Momčilov pentris panoramon de Varno, sur kiu klare vidiĝas oranĝkolora la Palaco de Sporto kaj Kulturo — la E-kongresejo. Sur la dekstra flanko brilas la E-stelo kaj sub ĝi surskribo: „63-a Universala Kongreso de Esperanto Varna 29. VII — 5. VIII. 1978“ — en 6 vicoj, sur verda fono.


La marko estas en eldonkvanto 120 000. Tio estas la kvina bulgara poŝtmarko, dediĉita al la internacia lingvo Esperanto.

Prof. Tonkin esprimas dankon al la gastiganta lando, al la bulgara Registaro kaj ĉiuj instancoj kaj organizaĵoj, kiuj helpis la okazigon de la majesta 63-a UK, speciale al la alta protektanto Petro Tancev, unua vicprezidanto de la Stata Soveto de Popola Respubliko Bulgario, al la Honora Komitato, al la direktoro de la Palaco de Sporto kaj Kulturo Todor Vekov, al la Bulgara E-Asocio kaj al la Loka Kongresa Komitato, aparte al ĝia prezidanto Nikola Aleksiev kaj la vicprezidanto Ĥristo Gorov. Li alvokas la membrojn de LKK sur la podiumon. Longe kaj tondre la publiko aplaŭdas la lokoko-anojn, ĉiu el kiuj aparte prezentigas. Prof. Tonkin enmanigas al ĉiu membro de LKK la plej novan libron de UEA — „25 jaroj — Antologio de la Belartaj Konkursoj“ — kaj florojn el la donacita al li bukedo.

En la nomo de LKK dankas al li la prezidanto de LKK Nikola Aleksiev. Li ankaŭ petas la kongresanojn esti indulgaj pri iuj mankoj en la organizo de la Kongreso, neeviteblaj en tiel amasa kongreso dum la plej streĉa feria sezono.

Kaj — la plej kortuŝa momento: la verda kongresa flago transiras el la manoj de la ĝisnuna prezidanto de LKK Aleksiev en la manojn de s-ro K. Greutert — la prezidanto de la nova LKK de la 64-a UK de E-o en Lucerno, Svislando. Eksonas solene „La Espero“ el miloj da voĉoj, el miloj da entuziasmigaj koroj.

La neforgesebla 63-a Universala Kongreso de Esperanto en Varno estas fermita.



REZOLUCIO

de la 63-a UK de Esperanto

La partoprenantoj de la 63-a UK de Esperanto, okazinta en Varno, Bulgario, de la 29 de julio ĝis la 5-a de aŭgusto 1978, diskutis pri la temo „Internacia lingvo — internacia edukado“.

Ili konstatis, ke:

- la ĉiaspecaj rilatoj trans landaj, kulturaj kaj lingvaj limoj fariĝas pli kaj pli multnombraj kaj multflankaj, kaj ke same rapide kreskas la neceso pri sendiskriminacia kunlaborado trans tiuj limoj;

- edukado por internaciaj kompreniĝo, kunlaboro kaj paco estas nepre antaŭkondiĉo por atingi harmonian kaj justan disvolviĝon de tiuj rilatoj kaj de tiu kunlaborado;

- ekzistas ne preteratentebaj aspektoj lingvaj de la edukado por internaciaj kompreniĝo, kunlaborado kaj paco.

Ili alvokas la internaciajn kaj landajn instituciojn kaj organizaĵojn:

- aparte memori la esencan gravecon de edukado al internacia kompreniĝo en spirito de egaleco kaj reciproka respekto, esprimitan ekzemple en la Rekomendo de UNESKO pri Edukado por Internaciaj Kompre-

niĝo, Kunlaboro kaj Paco kaj Edukado rilate al Homaj Rajtoj kaj Fundamentaj Liberecoj;

- prikonsideri, ke tiu eduka procedo etendiĝas tra la tuta vivo kaj ne estas limigita nur al formala klerigo;

- atenti, ke internacia kompreniĝo antaŭsupozigas la necesajn rimedojn, inkluzive de la lingvaj rimedoj;

- esplori la efikon al internacia kompreniĝo de la nuna lerneja kaj eksterlerneja edukado kaj pristudi alternativajn modelojn utiligante ankaŭ la eksperimentojn faritajn kaj faratajn en pluraj landoj, interalie sub aŭspicio de Internacia Ligo de Esperanto-Instruistoj (ILEI), pri la lerneja instruado de la Internacia Lingvo Esperanto;

- kaj esplori la spertojn akiritajn dum pli ol naŭdek jaroj per la lernado kaj uzado de la Internacia Lingvo Esperanto, kiu, ebligante senperan ĉiudirektan aliron al aliaj kulturoj, edukas siajn uzantojn al plivas-tigo de la propra alrigardo al la mondo kaj al respekto de kultura diverseco.

ĈE LA E-DOMO EN PISANICA

Tuj post la UK okazis postkongresa ekskurso al Smoljan-distrikto en la ĉarma Rodopi-montaro.

La 7—8-an de aŭgusto en Smoljan alvenis ankaŭ la prezidanto de UEA, prof. d-ro Tonkin, kaj Nikola Aleksiev — la prezidanto de LKK de la 63-a UK. Ili kaj iliaj akompanantoj estis akceptitaj de la vicprezidanto de la Distrikta Popola Soveto Roman Romanov, kiu konigis al ili la ekonomian kaj kulturen disvolviĝon de Smoljan-distrikto kaj la laboron de la e-istoj en ĝi. Akompanate de R. Romanov la gastoj vizitis la planedarion, la Etnografian Muzeon, la ĉarman ripozlokon Pamporovo, la kanjonon de Trigrad kaj diversajn turismajn objektojn, kiujn ili admiris.

La 8-an de aŭgusto la altrangaj gastoj venis al Pisanica, kie estas konstruita unika internacia E-lernejo. En tiu momento tie

estis ankaŭ la ekskursantaj e-istoj el 18 landoj (USSR, Japanio, Usono, Novzelando, Italio, Aŭstrio, Danlando, FRG, Svisujo ka). Krom la organizita ekskursista grupo estis alvenintaj kelkdekoj da aliaj kongresanoj, ankaŭ e-istoj el Smoljan-distrikto.

La gastoj kun granda intereso trarigardis la novan 5-etaĝan E-domon.

Poste antaŭ la domo okazis kunveno. Nikola Aleksiev parolis pri la entuziasma laboro, kiun la e-istoj el Smoljan kaj ĝia distrikto donis en la konstruado de tiu ĉi majesta E-bazo, kiu post nelonga tempo malfermos siajn pordojn por la unuaj kursanoj el nia lando kaj el eksterlando. Li esprimis grandan dankon al la Distrikta Komitato de la Bulgara Komunista Partio kaj la Distrikta Popola Soveto pro ties helpo. Aparte li dankis al la Distrikta Estraro de BEA kaj ĝia prezidanto Jordan Jordanov.

(Sur p. 25)



REMEMORE AL LA 63-A

Serpentumas la vojo montara,
preterkuras la rokoj ĉe l'voj'.
Jen alternas la strio arbara. . .
Kaj ekkantas la koro pro ĝoj'.

Kara lando bulgara, gefrata,
ree vidas mi vin en real'.
Mildaj homoj ridetas surstrate.
Konturiĝas Balkan' en vual'.

Jam postrestis Varno kaj Sofio,
Nigra Maro kaj Vitoŝa-mont'.
La plej festa, agrabla ferio :
la kongres' Esperanta de l'mond'.

Mia rev' realiĝis finfine :
partoprenis mi en la kongres'
por labori plenforte, obstine
en unika etos' kaj sukces' . . .

„Verda land' — Bastion' Esperanta“ —
nomas vin la mondo, Bulgari'.
Brila pruvo — la kongres' giganta,
alta pint' en nia histori'.

Tiujn tagojn forgesi ne eblos,
restos ili en kor' kaj memor',
tra multjara vualo videblos —
ĝis la lasta malgaja vivhor'.

10. VII. 1978 (Dum postkongresa rondvojaĝo
al Šipka — Gabrovo)

— La internacia E-bazo en Pisanica fariĝos altira forto por la nialandaj kaj eksterlandaj e-istoj, kiuj ĉi tie ripozos, lernos kaj perfektigos sin en la lingvo de d-ro Zamenhof — lingvo de internaciismo, interpopola amikeco kaj paco, tiel dezirataj de la tuta homaro, — diris k-do Aleksiev.

Gratulante la novan sukceson de la bulgaraj e-istoj, prof. Tonkin aparte substrekis la signifon de la nova E-bazo por la disvastigo de E-o. Li deklaris, ke UEA kunagos per ĉiuj fortoj kaj rimedoj, por ke en la internacian E-lernejon en Pisanica venadu maksimuma nombro da eksterlandaj e-istoj el la kvin kontinentoj. Li promesis helpi por varbado de plej elstaraj instruantoj, samkiel por havigo de literaturo kaj instruiloj por la E-lernejo.

Al d-ro Tonkin oni enmanigis donacon, kin-rememorigu al li pri la iniciatemaj kaj laboremaj rodopaj e-istoj.

Post la kunveno la eksterlandaj e-istoj ekskursis al Smoljan, Pamporovo kaj al la Kanjono de Trigrad.


Vespere la reprezentantoj de la apartaj nacioj esprimis bonegajn impresojn pri la ĉarma montaro kaj ĝiaj loĝantoj.

INTERVJUO

kun prof. d-ro H. TONKIN —
la prezidanto de UEA

Unue, la kutima demando : Kiaj estas viaj impresoj de Bulgario kaj de la bulgaroj ?

Tiu ĉi mia vizito ne estas la unua en Bulgario: mi estis ĉi tie en 1963 j., kiam en Sofio okazis la 48-a UK de E-o. Tiu ĉi dua UK en Bulgario prezentis problemojn, kiajn la unua Kongreso ne prezentis: ĝi estis konsiderinde pli granda (4500 homoj)



kaj okazis en Varno dum la plej streĉa periodo de la turisma sezono. Sed ĝenerale niaj gastigantoj scipovis aranĝi tiujn problemojn bone, kaj entute ni estas tre kontentaj en via ĉefa feriejo.

Mi trovis Sofion multe ŝanĝita. Estas multe pli da vivo, pli da rafiniteco, pli alta nivelo de prospero. Kiel parolanto de E-o mi povas paroli kun multaj homoj senpere kaj miaj opinioj devenas ne nur el rigardo al la loko, sed ankaŭ el miaj multaj konversacioj kun bulgaraj amikoj kaj kolegoj. La bulgaroj estas facile koneblaj kaj en via ĉefurbo estas amikeco, kiu mankas en multaj aliaj landoj.

Kiom koncernas la landon ĝenerale, ĝi estas nesufiĉe konata en la Okcidento. Kiam mi provis telefoni el Filadelfio al mia edzino (ŝi estis alveninta en Bulgariion antaŭ ol mi), la telefonistino ŝajnis pensi, ke Sofio estas ie en Iovao. . . Sed ni faras ĉion eblan por ŝanĝi tion ĉi: la homoj devas scii pri la belega nigramara bordo, pri la montaroj ĉirkaŭ Smoljan, pri ĉiuj belegaj aĵoj, kaŝitaj en la anguloj de la bulgara kamparo.

(Sur p. 26)

Kion vi povas diri al ni pri la 63-a UK de E-o kaj pri ĝia signifo por la monda E-movado?

La temo de la Kongreso estis la internacia edukado, tio ĉi signifas edukadon por internacia interkompreniĝo. Homoj el pli ol 50 landoj partoprenis en la diskutoj kaj ĉiuj en ununura lingvo. Ĉar E-o estas dua lingvo, destinita por internacia komunikado, ni ne bezonis tradukistojn aŭ interpretistojn. Tiu ĉi rekta diskutado pri tiel grava temo montriĝis tre valora, inter alie pro tio, ke la partoprenintoj reprezentis enorman gamon de politikaj opinioj kaj grandan variecon de socia kaj kultura aparteneco. Ni venis al unu principa konkludo: ke la internacia kompreniĝo devas esti perceptita laŭlitere. Ĝi implicas *interkompreniĝon*, ne nur rideton trans la lingvan barieron aŭ mutan manpremon. Kaj por tia interkompreniĝo ni bezonas lingvon — prefere tian, kiu estas facile lernebla kaj metas ĉiun homon sur la bazon de la egaleco.

E-o povas fari eksterordinare multe por plua vera interkompreniĝo trans la naciaj limoj — kaj ne nur kiel temo en la lernejoj, sed kiel io de dumviva edukado. Se ni komprenas unuj la aliajn plene, estas almenaŭ certa espero, ke ni estos malpli emaj insulti unuj la aliajn, malpli emaj trompi unuj la aliajn. E-o ne alportos aŭtomatpacon, sed ĝia idealo pri vera interkompreniĝo certe helpas.

La Kongreso montriĝis grava ankaŭ en alia aspekto. Ni kontaktis vicon da gvidantoj de E-o aktivecoj en landoj, kie antaŭe malmulto estis farata. Estas fakto, ke E-o fariĝas rapide moda en landoj ekster Eŭropo. Nun Brazilo, Venezuelo, Meksikio, Peruo kaj Malto estis aldonitaj al nia listo de landaj asocioj kaj la diskutoj progresas kun Sovetunio, Ĉinio kaj vico da aliaj landoj en Azio kaj Latina Ameriko. En tiaj landoj ekzistas kreskanta konscio, ke la lingvo, simile al la raso aŭ la sekso, povas esti uzata kiel instrumento de diskriminado. Pere de konservado de la naciaj lingvoj por *nacia* utiligo E-o solvas tiun ĉi problemon en la internacia sfero.

La pasintan jaron la ĝenerala direktoro de UNESKO ĉeestis nian kongreson en Rejkjavik. Tiun ĉi jaron li sendis reprezentanton. Estas klare, ke UNESKO kaj aliaj organizaĵoj manifestas ĉiam pli grandan intereson pri nia laboro. Ni estas ege kuraĝigitaj de tio ĉi. Ĝi kondukas al plifortigo de niaj konsultaj rilatoj kun UNESKO.

Resume: inspira kongreso en bela lando! Mi dankas vin pro via gastamo, Bulgario!

Intervjuis: K. Vălev

Petro Tanĉev akceptis la prezidanton de UEA

La 29-an de julio Petro Tanĉev — unua vicprezidanto de la Stata Soveto de PR Bulgario kaj prezidanto de la Honora Komitato de 63-a UK de E-o, akceptis en la registara restadejo Evksinograd la prezidanton de UEA prof. d-ro Humphrey Tonkin.

En la renkontiĝo, okazinta en amikeca kaj afergvida etoso, partoprenis ankaŭ la prezidanto de LKK Nikola Aleksiev.

LA 63-A UK EN LA BULGARA GAZETARO, RADIO, TELEVIDO KAJ FILMO

La preparlaboroj por la 63-a UK de E-o altiris delonge la atenton de la bulgara gazetaro kaj radio. En daŭro de du jaroj tiuteme aperis kelkdeko da artikoloj kaj informoj. Ilin ni ĉi tie ne mencias. Nia informo limiĝos pri la periodo ekde la gazetara konferenco en Sofio ĝis la tagoj post la Kongreso.

La centra gazetaro, radio kaj televido en nia lando plenatente rilatis al la Kongreso kiel pri grava socia evento.

La plej disvastigita kaj plej influa ĵurnalo „*Rabotniĉesko Delo*“ (850 000 ekz.), organo de CK de BKP, aperigis 8 prikongresajn materialojn. La unua aperis la 21-an de julio. Surbaze de la gazetara konferenco la redakcia ĵurnalisto Mladen Georgiev sur tri kolumnoj detale skribis pri la E-movado en Bulgario kaj pri la antaŭstaranta UK. En la tago post la inaŭguro de la Kongreso la sama ĵurnalo dediĉis 4-kolumnan informon de la korespondanto de la Bulgara Televida Agentejo Leon Aĝeman pri la solenaĵo, akcentante la parolojn de la alta protektanto Petro Tanĉev kaj de la prezidanto de UEA d-ro H. Tonkin. En la sekvantaj tagoj la ĵurnalo regule informis pri la laboro de la Kongreso. La 3-an de aŭgusto ĝi aperigis eldirojn pri la Kongreso kaj pri nia lando fare de d-ro Tonkin.

Alia influa ĵurnalo, „*Zemedelsko Zname*“, organo de la Agrarista Partio, aperigis 4 informojn pri kongresajn. Aparte detala estis la korespondaĵo pri la solena inaŭguro.

Ĵurnalo „*Oteĉestven Front*“, organo de la plej amasa, senpartia organizaĵo en Bulgario, la dua laŭ eldonkvanto, ne informis potage pri la Kongreso, sed aperigis 5 prikongresajn materialojn. La 28-an de julio en sia semajna 12-paĝa versio ĝi disponigis lokon por ampleksa intervjuo kun d-ro Tonkin sub la titolo „Lingvo de interpopola interkompreniĝo. La prezidanto de UEA Humphrey Tonkin pri la estonto de Espe-



ranto". La intervjuon faris la redakcia ĵurnalisto Andrej Andreevski. Aliaj du informoj menciis la E-eldonaĵojn lige kun la Kongreso kaj la E-poŝtmarkon, ĵus aperintan. La 2-an de aŭgusto la ĵurnalo donis lokon al eldiroj de H. Tonkin post la Kongreso, kaj la 5-an de septembro aperigis grandan artikolon pri la prezento de Bulgara E-Teatro de la konata bulgara ĵurnalisto Miĥail Sakle.

La organo de la sindikatoj „Trud“ aperigis (30. VII) intervjuon kun N. Aleksiev, prezidanto de LKK. La intervjuon faris la ĵurnalisto Genadi Georgiev. La sekvan tagon (31. VII.) ĝi detale informis pri la solena inaŭguro.

La sofia ĉiutaga ĵurnalo „Večerni Novini“ aperigis informon (19. VII) pri la gazetara konferenco.

La junulara ĵurnalo „Narodna Mladeŝ“ elektis por informi (3. VIII) pri la infana kongreseto en la kadroj de UK.

La porsoldata ĵurnalo „Graničar“ (19. VII) donis lokon al priesperanta informo lige kun la gazetara konferenco.

La loka ĉiutaga ĵurnalo „Narodno delo“ en la kongresa urbo Varno aperigis plurajn informojn pri la Kongreso (laŭ nia kalkulo 8, sed eble pli).

La distrikta ĵurnalo „Zname na Komunizma“ en u. Târgoviște donis lokon al ampleksa informo de la redakcia ĵurnalisto Ana Ralčeva pri la kongresaj aranĝoj, akcentante pri la partopreno de la koruso, orkestro kaj dancensemblo de tiu urbo en la belartaj programoj.

Aliaj tri distriktaĵ ĵurnaloj dediĉis artikolojn kaj informojn pri kongresajn: „Šumenska Zarja“ — u. Sumen (25. VII), „Slivensko Delo“ — u. Sliven (5. VIII) kaj „Rodopski Ustrem“ — u. Smoljan (16 kaj 19. VIII).

La semajna ĵurnalo „Sofiaj Novaĵoj“ kiu aperas en angla, franca, germana kaj

rusa, aperigis kelkajn pri kongresajn materialojn: ampleksan informon (2. VIII) de sia speciala sendito pri la inaŭguro de la Kongreso kaj pri la spektaklo de Bulgara E-Teatro, intervjuon kun la prezidanto de UEA H. Tonkin (28. VII), intervjuon kun Ursula Grattapaglia, d-ro W. Bormann kaj la atristino de BET Margarita Duparinova. En la sama numero estas publikita ankaŭ informo pri la poŝtmarko, eldonita lige kun la UK.

Sume 13 bulgaraj ĵurnaloj aperigis 39 artikolojn kaj informojn pri la 63-a UK. Sed tiuj ciferoj niaopinie ne estas definitivaj. Ni ankoraŭ ne pri ĉio ricevis informon.

La nacia Radio Sofia dum la kongresaj tagoj ĉiutage informis en siaj ĉefaj emisioj pri la Kongreso. La regiona radio en Varno ankaŭ informis ĉiutage. La regiona radio en Plovdiv disaŭdigis informon pri la postkongresa ekskurso al u. Smoljan kaj pri la simbola inaŭguro de la Internacia E-Kursejo en v. Pisanica apud tiu urbo kun la partopreno de H. Tonkin kaj N. Aleksiev. En alia emisio ĝi disaŭdigis la eldirojn de e-istoj el 4 nacioj, partoprenintaj la postkongresan ekskurson.

La Bulgara Televido kelkfoje informis pri la Kongreso; krome ĝi donis lokon al 4-minuta intervjuo kun d-ro Tonkin.

La Bulgara Kinematografio en sia aktuala semajna kino-ĵurnalo dediĉis detalan raportojn pri la Kongreso, spektata en daŭro de tuta semajno en ĉiuj kinejoj de la lando antaŭ la ĉefa filmo.

Ankaŭ la 34-a Kongreso de TEJO en Veliko Târnovo ne estis neglektita fare de la bulgara gazetaro. Pri ĝi ni vidis 8 informojn kaj artikolojn en 4 ĵurnaloj: „Rabotniĉesko Delo“, „Trud“, „Narodna Mladeŝ“ kaj „Borba“ (u. V. Târnovo). Certe la materialoj pri la Junulara Kongreso ankaŭ estas multe pli.

Kr. Karucin

RENKONTIĜO DE SOFIAJ KAJ SOVETAJ ESPERANTISTOJ

Profunde emocia estis la renkontiĝo de sofiaj e-istoj kun la oficiala 100-membra grupo de sovetaĵ e-istoj, veninta por la 63-a UK. Ĝi okazis la 24-an de julio en la Domo de Soveta Scienco kaj Kulturo en Sofio. Ĉeestis ĉ. 500 personoj.

La solenan renkontiĝon malfermis k-do Ĥristo Ĝorov — prezidanto de BEA, kiu bonvenigis la karajn gastojn. Li donis la parolon al Kunĉo Vâlev — sekretario de BEA kaj ĉefredaktoro de „Bulgara Esperantisto“.

En sia arda parolado K. Vâlev priglorigis la profundan kaj sinceran amikecon inter la bulgaraj kaj sovetaĵ e-istoj. Ĝi naskiĝis kaj kreskis sur la fekunda grundo de la tradicia amikeco inter la du frataj popoloj —

bulgara kaj rusa. La unuan lernolibron de E-o la bulgaroj ricevis de la rusoj tuj post ĝia apero, dank' al la viglaj kulturaj rilatoj inter ili. Miloslav Bogdanov, la unua bulgara e-isto, fondinto de la unua bulgara E-societo (1889 j.) kaj aŭtoro de la unua E-lernolibro por bulgaroj (en la komenco de 1890), estis elektita kiel honora membro de la E-societo en Peterburgo (1900 j.). Tiu amikeco hardiĝis en la batalo kontraŭ la faŝismo. Nun ĝi donas riĉajn fruktojn en la komuna frata laboro kaj batalo por socialismo, por pura, serena ĉielo super nia planedo. Aparte fruktodona estas hodiaŭ la amikeco kaj kunlaboro inter la bulgaraj kaj sovetaĵ e-istoj sur la E-kampo: vigla kaj amasa korespondado, interŝanĝo de

E-literaturo kaj periodaĵoj, ĝemeliĝo de E-klubo, reciproka gastado ktp. Pri tio parolas ankaŭ la impona grupo de sovetaj e-istoj por la 63-a UK, frunte kun respondecaj gvidantoj de la Soveta Societo por Amikeco kun Eksterlando.

En la nomo de la Tutpopola Komitato de Bulgara-Soveta Amikeco en nia lando varme salutis la gastojn ankaŭ doc. Gančo Todorov, ĉefsekretario de la Komitato.

Al la salutoj respondis k-do Saakov, gvidanto de la soveta grupo. Li esprimis la varman amikecon de la sovetaj homoj al la bulgara popolo kaj donis altan pritakson al la nobla laboro de la bulgaraj kaj sovetaj e-istoj en la batalo por internacia amikeco kaj kunlaboro, por paco kaj malstreĉiĝo en la internacia vivo.

Sekvis belarta programo, kiun malfermis per tri kantoj la nedelonge fondita kantoro de la Sofia E-Societo „Maksim Gorkij“ sub la gvido de Dimitro Terziev. La

programon partoprenis ankoraŭ: Vera Vaĵarova (recitis du versaĵojn de Asen Grigorov — „Espero nia!“ kaj „Gardu la pacon!“), la operartistino Maria Angelova („Mi ekamis“ de Sergej Rahmaninov kaj „Knabino“ de Dobri Ĥristov), la artisto el la Stata Muzikteatro Veselin Damjanov (bukedo el popularaj rusaj kaj sovetaj kantoj), la artisto Mišo Zdravev (recitaĵo de „La volontuloj ĉe Sipka“ de Ivan Vazov) kaj la aktorino Belka Beleva (recitaĵo de fragmento el la poemo de Valeri Petrov „En la mola aŭtuno“). La soveta e-isto Vladimir Pacjurko recitis sian tradukon de versaĵo de Maksim Riĥskij pri Bulgario.

Fine la publiko ĝuis la projekciadon de du mallongaj filmoj — bulgara kaj soveta.

Ĉiuj ĉeestintoj longe memoros tiun renkontiĝon — manifestadon de la sankta bulgara-soveta amikeco, de la sincera, frata amikeco inter la bulgaraj kaj sovetaj e-istoj.

POSTKONGRESA KUNVENO DE LA SOFIA E-SOCIETO «MAKSIM GORKIJ»

Troviĝante ankoraŭ sub la impresoj de la impona 63-a UK, la sofiaj e-istoj okazigis la 9-an de aŭgusto en la salono de E-Societo „M. Gorkij“ solenan postkongresan kunvenon, kiun ĉeestis la elstara E-poetino d-rino Marjorie Boulton (Marjori Boulton) el Anglujo kaj ĉirkaŭ 20 aliaj gastoj-kongresanoj el FRG, Hispanio, Irlando, Madagaskaro, Rumanio, Sovetunio, Usono ka.

La kunvenon gvidis Kiril Draĵev. Li prezentis al la ĉeestantoj la faman E-poetion Marjorie Boulton, invitinte ŝin kaj la bulgarajn E-poetojn Asen Grigorov kaj Simeon M. Simeonov okupi lokojn en la prezidio. Draĵev rakontis koncize pri la ampleksa verkaro de d-rino Boulton, konsistanta el 28 libroj, el kiuj 13 en angla lingvo kaj 15 en E-o. Inter la verkoj en E-o aparte reliefigas la 250-paĝa biografio de Zamenhof (aperinta unue en la angla), la ampleksaj poemaroj „Eroj“, „Kontralte“, „Cent ĝojkantoj“, la „Rimletoj“ ka. Dramaj verkoj: „Virino ĉe la landlimo“, „Nia sango“, „Ni aktoras“. Beletraj kajeroj: „Okuloj“, „Kvarpieda kamarado“, „Dekdu piedetoj“ ka. M. Boulton faris sukcesajn prelegvojaĝojn en Svedio, Hungario, Nederlando, Pollando. En 1958 ŝi estis proklamita „Esperanto-aŭtoro de la jaro“. En 1976 Boulton doktoriĝis kaj nun laboras kiel profesia verkistino en Oksfordo.

Petite de la publiko, M. Boulton emocie legis sian poemon „Zamenhofa stilo“. Si verkis ĝin en la jaroj, kiam kelkaj elstaraj e-istoj tre akre diskutis pri gramatikaj problemoj (la diskuto „ata-ita“), kio profunde vundis ŝian koron. La poetino legis ankaŭ sian spritan poemon „Leontodo“, kiu havas tre originalajn rimojn. La publiko entuziasme aplaudis ŝin.

La artistino Vera Vaĵarova majstre recitis tri mallongajn poemojn de Boulton: „Hiroŝimo“, „Flustre“ kaj „Manpremo“. Vaĵarova same rikoltis ardajn aplaŭdojn.

Post tio por eldiroj estis invititaj la fremdlandaj gastoj. S-ano Bunja Bunesku, prezidanto de la E-klubo en Bukureŝto, transdonis la salutojn de la rumanaj e-istoj kaj rakontis koncize pri ilia agado, kiun kronis la eldono de esperantlingva numero de la luksa revuo „Ferioj en Rumanio“, disdonita al ĉiuj kongresanoj en Varno. Eldirojn faris la du gastoj el Madagaskaro — Rakutundravau kaj Raveloson, kiu detale rakontis pri la situo, klimato kaj popolo de sia lando, plej detale tamen pri la malagasa lingvo, kies alfabeto estas kiel la japana kaj ĉina, sed ĝi sonas kiel la itala kaj laŭ simpleco, logikeco kaj riĉeco je 80% similas al E-o. Por subteni sian aserton, s-ro Raveloson recitis poemon en la lingvo parolata en Madagaskaro. Salutojn prezentis ankaŭ s-ano Harmušek el Ĥarkov — Sovetunio. Li dankis pro la granda gastamo kaj helpemo de la bulgaraj e-istoj, kiuj tre afable renkontis la 140 sovetajn samideanojn, venintajn al la Kongreso en Varno, kaj daŭre helpas al la soveta E-movado per libroj, revuoj ka.

En la nomo de la estraro de Sofia E-societo „M. Gorkij“ s-ano Draĵev prezentis al d-rino Marjorie Boulton bukedojn de diantoj kaj rozoj kaj dekoris ŝin kaj ĉiujn fremdlandajn gastojn per la ora insigno de BEA. Li enmanigis al ĉiu po du malhelruĝaj rozoj por rememoro pri Bulgario, la lando de la rozoj.

La kunveno finiĝis en amika kaj festa etoso.

Rajna Konstantinov.





34-A INTERNACIA JUNULARA KONGRESO DE TEJO

22—29 julio, 1978 — Veliko Târnovo

Inaŭguro

La 23-an de julio je la 10-a' horo la prezidanto de TEJO Savas Tsiturides malfermis solene la 34-an Internacian Junularan Kongreson. Li transdonis la parolon al la prezidanto de LKK Dimitro Papazov, kiu varme salutis la 450 partoprenantojn el 26 landoj (inter kiuj ankaŭ el foraj landoj kiel Japanio, Kanado, Hispanio, Francio, Anglio, FRG, Nederlando ka). Sincerajn salutojn kaj bondezirojn esprimis Pejo Berbenliev, vicprezidanto de la Komitato pri Kulturo kaj reprezentanto de la Alta Protektanto de la 34-a IJKK-dino Ljudmila Jivkova. Bonvenigis la gejunulojn kaj deziris fruktodonan laboron al la Kongreso ankaŭ la urbestro de Veliko Târnovo Ivan Gingoŭ, la membro de CK de Komsomolo Petro Balkanski kaj la prezidanto de LKK de '63-a UK de E-o Nikola Aleksiev. Ĉeestis la inaŭguron ankaŭ d-ro Humphrey Tonkin — prezidanto de UEA, d-ro W. Bormann — ĝenerala sekretario de UEA, Julie Tonkin — prezidantino de la Virina Komisiono de UEA, R. Radoslavov — unua sekretario de DK de Komsomolo en V. Târnovo, ka.

Post 10-minuta paŭzo la prezidanto de UEA d-ro Humphrey Tonkin faris enkondukan paroladon al la ĉeftemo de la Kongreso „Esperanto kaj la interjunulara amikeco“.

Sekvis solena koncerto kun riĉa belarta programo. Entuziasme kantis la infana E-koruso „Steleto“ de urbo Kjustendil, kiu gajnis la publikon per sia altnivela arto. La konata aktorino Belka Beleva brile recitis fragmenton el poemo de Valeri Petrov. Proprajn komponaĵojn plenumis la talenta bulgara baritono Veselin Damjanov. Per du arioj bone prezentis sin la juna operkantistino Radka Malamova. La koncerto fi-

niĝis per popolaj dancoj en plenumo de danca ensemblo ĉe la Distrikta Popola Soveto de V. Târnovo.

Fine estis plantita memorarbo en la urba ĝardeno.

LABORPROGRAMO

Laborgrupoj

La kongresa ĉeftemo „Esperanto kaj la interjunulara amikeco“ estis traktita en kvin laborgrupoj.

I. La laborgrupo *«La sciencetecnika progreso kaj la estonte o de la Internacia Lingvo»* sub la gvido de Nikola Uzunov (Bulgario) konstatis, ke dum la XX-jc. la diverslingva libra „Himalajo“ ĉiam pli altiĝas kaj la oceano de ĉiuspecaj nacilingvaj eldonaĵoj pliprofundiĝas kaj vastiĝas. La multlingveco estas grava baro por komunikado de sciencetecnikaj scioj en monda skalo.

En la diskutoj oni deklaris, ke la e-istoj ne devas atendi pasive la oficialigon de E-o fare de la registaroj.

La baza konkludo de ĉi tiu laborgrupo estis, ke necesas komenci tradukadon en E-on de kelkaj fundamentaj universitataj lernolibroj, kiuj donos realan utilon al la studentoj kaj tiel altigos ilian interesigon kaj altiros novajn adeptojn de E-o.

La Komitato de TEJO devas starigi tradukistajn grupojn, kiuj laboru tutan jaron sub la gvido de redaktoro-fakulo. Tiu laboro estu subvenciata de UEA.

II. Dum la unua kunsido de la laborgrupo *«La junularo kaj la movado por malstreĉiĝo»* la gvidanto Michael Lennart (GDR) faris mallongan enkondukan paroladon, en kiu li emfazis la gravecon de la temo pri urĝa malstreĉiĝo ankaŭ en la milita sfero. En mala okazo la ĝenerala mal-

streĉeco estos serioze minacata.

En la laborkunsidoj okazis vigla dikutado pri la malstreĉiĝo en la kampoj politika, ekonomia kaj milita. Aparte impresis la parolo de soveta e-isto pri la stato de la sovetaĵ junulara kaj E-movadoj kaj ties batalo por paco.

III. La laborgrupo «*Esperanto kaj la neesperantistaj junularaj organizaĵoj (NEJOj)*» sub la gvido de Pola Studenta E-Komitato traktis problemojn spertatajn en la prezentiĝo de la junulara E-movado ekstere. Oni substrekis, ke ekzistas tre grandaj diferencoj inter la enmovada kaj ekstermovada vidpunktoj. La junulara E-movado devas posedi kapablajn gvidantojn, kiuj bone orientiĝu pri NEJOj kaj ties perceptmanieroj.

La laborgrupo proponis al la Komisiono por Eksteraj Rilatoj (KER) de TEJO:

— lanĉi diskuton kaj verki materialojn traktantaj la junularan E-movadon laŭ la ekstermovada maniero;

— okazigi seminariojn por gvidantoj, ĉu apartajn, ĉu enkadre de tradiciaj E-aranĝoj (Internacia Seminario de Germana E-Junularo, IJK, Internacia Junulara Festivalo en Italio ka);

— revivigi kaj plilarĝigi la kontaktojn kun NEJOj (precipa priatento de ISMUN);

— ellabori longtempajn strategiojn de la junulara E-movado por ĝiaj rilatoj kun NEJOj.

IV. En la laborgrupo «*La internacia interŝanĝo de kulturaj valoroj*» oni emfazis, ke kulturan karakteron al la lingvo donas la kulturaj valoroj, kiujn ĝi entenas, kaj la kulturaj celoj, por kiuj ĝi estas utiligata.

Krom la E-literaturo kiel plej grava trezoro oni menciis kaj pridiskutis ankaŭ aliajn aplikojn de la lingvo por kulturaj celoj: Belartaj Konkursoj kaj teatraj prezentoj enkadre de la ĉiujaraj UK, pup teatraj internaciaj festivaloj ka. En la sfero de kulturaj interŝanĝoj sur universitata nivelo elstaras Internacia Somera Universitato dum UK kaj la Somera E-Universitato en Gjula (Hungario).

V. Sub la gvido de Bojka Batalska (Bulgario) funkciis la laborgrupo «*Balkanaj popoldancoj*». Dum la ĉeesto de sperta instruikiisto kaj muzika akompano oni lernis la dancojn „ĥoro“, „râcenica“ (kelkaj specoj), „sirtaki“ ka.

Aliaj laboraktivecoj

Estis akceptita projekto de nova STATUTO de TEJO. (Ĝi estis ratifikita poste de la UEA-Komitato dum la 63 UK en Varno.)

*
La Komitato de TEJO akceptis la aliĝon de nova landa sekcio — la ĉeĥa. Tiel la sekcioj de TEJO fariĝis 31. Inter la plej grandaj oni notis tiujn de Belgio, Brazilo, Bulgario, FRG, Hispanio, Hungario, Italio, Jugoslavio, Pollando kaj Svedio.

*
La ĝenerale vigliĝanta junulara E-movado montras apartajn sukcesojn en Sud-Ameriko. La estrarano Floreal Gabalda (Francio), kiu okupiĝas pri tiu ĉi parto de la mondo, sciigis pri amasaj aktivecoj en Brazilo kaj pri alta interesiĝo pri E-o inter la gejunuloj en la kontinento.

*
Oni elektis la jenan Estraron de TEJO:
Prezidanto: *Savas Tsiturides* (Greklando)
Vicprezidantoj: *Stefan MacGill* (Nederlando)
Csaba Lendvay (Hungario)
Ĝenerala sekretario: *Bruĉjo Kasini* (Italio)
Sekretario: *Thomas Bormann* (FRG)
Membroj: *Szabo Imre* (Hungario), *Amri Wandel* (Israelio), *Floreal Gabalda* (Francio), *Gert van Tongerloo* (Belgio).

*
La kongreso sendis gratulotelegramon al la XI-a Monda Festivalo de la Junularo kaj Studentaro en Kubo.

Prelegoj

Okazis kvar prelegoj je bona faka nivelo: «*La rolo de E-o por ekkono de la arto kaj kulturo de la popoloj*» de prof. *Stojan Ĝiĝev* (Bulgario), «*Ctimologio de E-o*» de *Alicje Michiewicz* (Pollando), «*TEJO hodiaŭ*» de *Stefan MacGill* (Nederlando) kaj «*Nederlando — domo de la 35-a IJK*» de *Johano Hoekstra* (Nederlando).

KULTURA PROGRAMO

Interkona Vespero

Ĝi okazis en kafejo „Poltava“ en la centro de la kongresurbo. La kongresanoj ĝuis riĉenhavan programon en amika etoso. Kontribuis reprezenta estrada orkestro „Orbita“ el Veliko Târnovo. Infana ensemblo „Bâlgarĉe“ (Bulgario) plenumis folklorajn dancojn. Dancis ankaŭ baletista trupo el Sofio. Estis lotumita tombolo.

Internacia Vespero

La vespero de artaj talentoj el multaj landoj estis atentokapta kaj tre amuza aranĝo. Multajn aplaŭdojn denove rikoltis la infana E-koruso „Steleto“ kaj aparte ties solistinoj. La japanaj dancoj de Kazu Jasuda kaj liaj samnacionoj tre variigis la programon. Elstare dancis ankaŭ Kostas Kiriakos el Greklando. Stefan MacGill prezentis amuzajn humuraĵojn. Kantgrupoj el Hungario kaj Jugoslavio plenumis E-kantojn.



Bulgara Vespero

Gi estis aparte impona artaranĝo. La kongresanoj ĝuis varian programon de popularaj kantoj kaj dancoj en plenumo de ensemblo „Bălgărce“ kaj la danctrupo ĉe la Distrikta Popola Soveto. Jorĵeta Zdraveva emociige plenumis recitalon „Bulgario“.

Teatra prezento

La Bulgara Esperantista Junulara Teatro Amatora (BEJTA) prezentis la teatraĵon „La veto“ de Ivanka Dakovska. La entuziasma ludo de la trupo kaptis la publikon kaj postlasis bonegajn impresojn. Aparte plaĉis la viglaj kantoj kaj dancoj en popola stilo.

Literatura Vespero

Tiu ĉi aranĝo estis aparte interesa ero en la kongresa programo. Estis proklamita „La verko de la jaro 1977“ kiel rezulto de referendumo organizita de la literatura gazeto „Literatura Foiro“. Ĝi estas la poemlibro „De tempo al tempo“ de Giorgio Silfer (Italio). Responde al demandoj de intervjuantoj el diversaj E-gazetoj la aŭtoro malkaŝis pliajn detalojn pri si kaj pri sia verko.

Dum la kabareta parto elstaris la kantisto Gianfranco Molle per siaj kvazaŭaj E-popoldancoj. Lerte gvidis la tutan programon Walter Zelazny (Pollando).

Adiaŭa Vespero

La adiaŭa vespero pasis kiel maskobalo sub titolo „Gaste en la palaco de reĝo Esperanto“. La publikon amuzis kaj dancigis la pola estrada ensemblo „Anda“. En la muzikaj paŭzoj estis projekciataj animaciaj filmoj de la soveta serio „Nu, pagadi!“ (Nu, atendu!).

Brile rolis kiel reĝo kaj reĝino „Esperanto“ la geaktoroj Belka Beleva kaj Anani Anev (Bulgario).

Tre solene kaj impone impresis la **geedziga ceremonio** de Kalmor Lajoŝ (H) kaj Emiliĵa Nandrova (Bg). Atestantoj estis la prezidanto de TEJO Savas Tsitirides (Greklando) kaj Mika Vaseda (Japanio).

La amuzado daŭris ĝis frua mateno.

EKSKURSOJ

Okazis enurba kaj tuttaga eksterurba ekskursoj. La kongresanoj kun vigla intereso trarigardis la vidindaĵojn de Veliko Târnovo. Aparte ravis ilin la originala situo de la urbo kaj la multnombraj kulturhistoriaj monumentoj kaj muzeoj.

La vojplano de la tuttaga ekskurso estis Veliko Târnovo — monaĥejo de Drjanovo — v. Bojenci — urbo Gabrovo — la etnografia parko-muzeo „Etâra“.

Eugeni Georgiev

REZOLUCIO

de la 34-a Internacia Junulara Kongreso

La partoprenantoj en la 34-a Internacia Junulara Kongreso de la Tutmonda Esperantista Junulara Organizo (TEJO), kunvenintaj el 26 landoj de ĉiuj kontinentoj en la urbon Veliko Târnovo, Bulgario, de la 22-a ĝis la 29-a de julio 1978,

esprimas

sian koran danksaluton al la publikaj instancoj de la gastama kongresa lando kaj sian sinceran gratulon al la sindediĉaj membroj de la Loka Kongresa Komitato kun bondezire, ke konstante progresu la bulgara popolo kaj la landa E-movado.

La Kongreso

diskutinte

la ĝeneralan temon „Esperanto kaj la interjunulara amikeco“ kaj doninte lokon al laborgrupoj pri: „La scientektika progreso kaj la estonteco de la Internacia Lingvo“, „La junularo kaj la movado por malstreĝigo“, „Internacia interŝanĝo de kulturaj ĉaloroj“, „Esperanto kaj la neesperantistaj vjunularaj organizoj“,

premisinte


ke la intensiĝo de kulturaj interŝanĝoj estas unu el la plej pozitivaj faktoroj akcelantaj la strebojn al paco kaj justeco en la mondo, kaj tial ĝi estas konsiderenda kiel fundamenta eduka stimulo speciale por la junjaro tutmonda,

konstatinte

ke la procezon de kulturaj interŝanĝoj kun la de ĝi nepre devenanta disvolviĝo de interjunulara amikeco forte bremsas kaj eĉ danĝere kompromitas la daŭran kaj bedaŭrindan ekzistadon de internacia lingva problemo,

(Sur p. 32)

La de geedziĝo E. Nandrova kaj K. Lajoŝ



emfazinte

ke almenaŭ la E-junularo sukcesis solvi la lingvan problemon en ekvilibra kunfando de interŝanĝo de spertoj kaj pensoj, kio permesas atingi signifajn rezultojn sur la kampo de internacia kaj interjunulara amikeco,

rimarkinte

ke estas urĝa tasko de la E-movado, unuavice de ĝia pli juna generacio, ne enfermiĝi en la ĝuo de atingita privilegio, sed malfermiĝi al la junularaj amasoj, kiuj sama forte bezonas tiujn kontaktojn, kiujn malhelpas la lingva problemo,

rekomendas

intensigi la rilatojn kun ĉiuj junularaj organizoj aktivantaj por la celoj: paco, internacia junulara kunlaboro, malarmado, kultura interŝanĝo, malstreĉiĝo, interpopola kunvivado, kaj atingi laŭeble partneran rolon en tiuj rilatoj,

informas

pri la pozitiva efiko kiun havas, aldone al la internaciskala laboro de TEJO kaj UEA mem, kelkaj institucioj sciencaj aŭ kulturaj, kiel la E-fako en la Budapeŝta Universitato „Eötvös Lorand“, la E-redakcioj de la naciaj radioj, la Centro de Dokumentado kaj Studo pri la Lingvo Internacia en La Chaux de Fonds en Svislando, la Interlingvistika Laborgrupo de la Soveta Akademio de Sciencoj en Moskvo, la Instituto pri Kibernetika Pedagogio en Padeborno, la Internacia Kultura Servo en Zagrebo, la Somera E-Universitato en Gyula ka., kies agado decide kontribuas al la eksterigo de la valoroj, akiritaj kaj akireblaj pere de la Internacia Lingvo,

komisias

al la Estraro kaj la gvidaj organoj de TEJO informi la aktivulojn de la organizo pri la rezultoj atingitaj dum la kongresaj laboroj.

16-A INFANA

Ankaŭ la plej junaj e-istoj havis sian kongreson. Kutime oni nomas ĝin Infana Kongreŝeto. Post kelkajara prokrasto ĝi denove okazis en sunoriĉa Varno.

La kongreŝetejo estis la bela lernejo „Ječka Karamfilova“. Tie por la infanoj estis ĉio: dormejoj, manĝejo, salono por amuzoj, korto kun diversaj iloj por gimnastiko kaj ludoj. Partoprenis 70 infanoj de aĝo 5 ĝis 13 jaroj el 6 landoj. Inter ili: 31 el Bulgario (Kazanlâk — 5, Petriĉ — 4, Sofio — 4, po 2 el Blagoevgrad, Pernik, Dospat, Ĥaskovo,

NI KONTRIBUAS AL LA PACO KAJ LA INTERNACIA AMIKECO

El intervjuo kun la prezidanto de TEJO SAVAS TSITURIDES

S-ro Tsiturides, kiaj estas viaj impresoj pri la organizo de la 34-a Kongreso de TEJO en V. Târnovo?



La Kongreso pasas bone, ĉar la Loka Kongresa Komitato faris multon por la bona organizo de ĉiuj aranĝoj. Ĉis nun ni havis eblecon konatiĝi kun la vidindaĵoj de V. Târnovo, kun bulgaraj junaj brigadoj, kun vidindaĵoj en la regiono de Gabrovo, kun terkulturistaj kooperativoj ka.

La nunan kongreson partoprenas 457 junaj e-istoj el 26 landoj. Tio ĉi signifas, ke la problemoj, kiujn ni pridiskutas, interesiĝos tuj la E-junularon en la tuta mondo. La E-junularo estas parto de la monda junularo, kaj tio ĉi signifas, ke ni helpas la kompreniĝon inter la gejunuloj en la mondo.

*Intervjuis: Goĉo Kolarov
El j. «Borba», 27. VII. 1978.*

KONGRESETO

Târgoviște, Dve Mogili, po 1 el Zlatica, Miĥajlovgrad, Polski Trâmbeŝ, Plovdiv. Trud, distrikto de Plovdiv), 20 el Hungario, 15 el Pollando, 2 el Ĉeĥoslovakioj po 1 el GDR kaj Usono. Denaskaj e-istoj estis 7 infanoj (3 el Bg, 2 el Pl, 2 el ĈSSR)

La partoprenintoj en la Infana Kongreŝeto kune kun junpionira blovmuziko el Velingrad (45 infanoj) kaj 30-persona grupo da lernantoj en bulgaraj naciaj kostumoj salutis la 63-an UK ĉe la inaŭguro. Tio estis vere kortuŝa momento. (Vd. p. II).



Dum unu semajno la infanoj ludis, kantis, ekskursis, amike kunestis sub la zorgoj de spertaj pedagogoj. Ili vizitis la spektaklon „La dormanta belulino“, prezentita de la Pupteatro de Varno, trarigardis la urbon, aparte la akvarion kaj la planedaron, ekster Varno — Alaĝa-monaĥejon, la nigramarajn ripozkompleksojn „Zlatni pjasaci“ (Ora Sablaro) kaj „Albena“. Apartan spektaklon por ili prezentis la konata iluziisto-esperantisto Triksini.

Ĉiuvespere estis iu aranĝo, plej ofte projekciado de diapozitivaj pri diversaj landoj. La lastan vesperon okazis karnavala balo, en kiu oni disdonis 3 premiojn por originalaj kostumoj. Krome, al ĉiu infano estis enmanigitaj memordonacoj: po 2 pupetoj (knabo kaj knabino en bulgara nacia kostumo) kaj la kantlibro „Flugas kanto tra la mondo“.

Vendrede posttagmeze okazis la sopirata renkontiĝo de la infanoj kun iliaj gepatroj kaj gastoj — ĉ. 150 personoj. Bulgaraj kaj hungaraj infanoj prezentis belartan programon, kaj la polaj — dramigitan fabelon de Andersen. Partoprenis ankaŭ kantĥoro de gelernantoj el Petriĉ, kiuj plenumis E-kantojn kun akompano de gitaroj.

Je la fino de la renkontiĝo eniris bulgara paro en naciaj vestaĵoj: viro kun „gajda“ (sakfluto) kaj virino kun platpano kaj salo, per kiu ŝi laŭ malnova bulgara popola kutimo bonvenigis la gastojn. Sub la sonoj de la vigliga „gajda“ la partoprenantoj en tiu neforgesebla festo ekdancis bulgaran popoldancon „ĥoro“ (rondodanco) kaj tiel, dancantaj, eliris eksteren, al la lerneja korto. Tie kun multaj ĝojoj, rido kaj krioj ekserpentumis la vigla popola danco.

Dum la lastaj horoj de la Kongreseto la infanoj, emociiĝintaj, interŝanĝis siajn adresojn, promesis skribi unu al alia, daŭre subteni tiun amikecon, kiu naskiĝis dum la neforgeseblaj kongre setaj tagoj.

Estus bone, se la e-istoj, kiuj donis multajn zorgojn kaj klopodojn por bone organizi la Kongreseton, daŭre interesiĝus pri la infanoj, se oni helpus ilin plue lerni E-on kaj perfektigi siajn lingvokononajn por fariĝi bonaj e-istoj. La karaj rememoroj el la infanaĝo malfacile perdiĝas. La Infana Kongreseto, sendube, por ĉiuj paroprenintoj restos por ĉiam kara, tre kara rememoro.

Bogdana Popova.

Pollando

Malgorzata Luczak, 08-470 Vilga, vil. Podole Nove (muziko, sporto, foto).

Maria Osłowska, 14-300 Marog, Gelbity (18-jara — bk, mod. muziko).

Maria Strawa, 31-733 Pikulice, Kipiatyć 44, Pšemysl (22-jara pri libro, sporto).

Mariola Romanowska, 77-300 Czluchow, str. Dobrowskiego 2/6 (16-jara — muziko, libroj).

Wanda Swider, 21-350 Mindzyrzec Podl., ul. Warszawska 35/X/12, woj. Biala Podlaska (18-jara — kun bulgaraj geedzoj, kiuj dezirus viziti Pollandon).

Andrzej Florczak, 62-850 Liskow, woj. Kalisz (19-jara — sporto, muziko, pm).

Henryk Porowski, 45-701 Opole, ul. Wroclawska 52/8 (22-jara instruisto — muziko, sporto, turismo, pm, bk, gram. diskoj).

Marko Gredzik, 08-400 ĝarwolin, str. Krzywa 2 (studento de fiziko — pri gram. diskoj, numizmatiko, turismo, recipro' a vizito).

Stawomir Ruszkiewicz, 67-100 Nowa Sól, str. Kossaka 19/6 (17-jara — E-literaturo).

Wo'ciech Chruszcz, 02-143 Warszawa, str. Zwirki i Wigury 17-a m 6 (19-jara — E-libroj, muziknoto, sonbendoj, fotoj, lingvoj pm, bk).

Svedio

Elly Lundmark, Delavägen 12, 702-17 Örebro (sinjorino — kun bulgaraj esperantistoj).

Momento el la vivo de la kongresanoj en V. Târnovo: liberaj konversacioj, lernado de diversnaciaj popoldancoj.

La fotoj, kde p. 6 ĝis la fino estas faritaj de Lasto Niko.



KARAJ GEAMIKOJ ESPERANTISTOJ,

Jam komenciĝis la abonkampanjo por la asocia organo
„BULGARA ESPERANTISTO“

por 1979 j., kiu finiĝas je la 30 de novembro.

Societaj, distriktaj kaj sekciaj estraroj de BEA, aktivuloj, legantoj,

Organizu tere la abonkampanjon ĉe vi! Ĉiu ĉenero de BEA devas inde plenumi sian deon: nepre superi tion, kion ĝi atingis en la pasintjaraj abonkampanjoj!

„Bulgara Esperantisto“ estas via plej bona amiko kaj helpanto. „Bulgara Esperantisto“ informas, organizas, instruas, edukas. Ĝi estas via verda tribunio. Subtenu ĝin plenforte en la plej decida momento — la abonkampanjo!

Abonkotizoj: por Bulgario — 2 levoj, por socialismaj landoj — 3.80 lv., por ĉiuj ceteraj — 4.16 lv. aŭ egalvaloro.

Abonado: nur pere de la poŝto! Prenu de tie kvitancaron por kolekti abonojn kaj vi havos ankaŭ gajnon!

Ne atendu la lastan tagon! Agu energie kaj senprokraste! Nia granda tasko estas: **NEFRE ATINGI 6100 ABEKNANTOJN!**

БЪЛГАРСКИ ЕСПЕРАНТСКИ СЪЮЗ

УЧИТЕЛСКА СЕКЦИЯ И СОФИЙСКО ОКРЪЖНО-ГРАДСКО РЪКОВОДСТВО

ЗАДОЧНИ КУРСОВЕ

Задочните курсове на Българския есперантеки съюз, организирани от неговата Учителска секция и Софийското окръжно ръководство, вече започват своята 11-та годишнина. Те се оказаха резултатна учебна форма. Особено подходящи са те за учителите и за всички ония, които по една или друга причина нямат възможност да посещават редовно присъствен курс. Стъчетани с едноседмичните занятия през новогодишната и пролетната ваканция на учителите, както и с 20-дневните международни летни курсове в Бургас, задочните курсове допринасят много за попълване редовете на българското есперантско движение с нови активисти — преподаватели, организационни работници и др.

Степени: начинаещи, напреднали и висша.

Такса за всички степени (включително учебното помагало) — 12 лв. Таксата се изпраща на адрес: с/ка 185/2553 на ДС Каса Благоевски район София.

За повече подробности: Софийско окръжно-градско ръководство на Българския есперантски съюз, бул. Хр. Ботев 97, 1303 София (тел. 31-61-80).

Окръжни, дружествени и секционни ръководства на БЕС, другари активисти,

Използвайте повишения интерес към есперанто след величествения 63-и Световен есперантски конгрес във Варна, за да наберете максимален брой курсисти за задочния курс. Така вие решавате вашите собствени проблеми и давате реален принос за по-нататъшния възход на българското есперантско движение.